



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 6 FF. Unujara abono kun adresaro : 30 FF

Ĝiri al la poŝtkonta numero : 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

"LAŬTE!" :

DEK JAROJ DA AMIKECO

Antaŭ dek jaroj komenciĝis la nuna - oficiala - serio de "Laŭte!", kiam, post pluraj jaroj da nur regiona disvolviĝo kun nur informa celo, ĝi ekambiĉiis fariĝi ankaŭ esprimilo por ge-amikoj el tuta Francio, kaj - kial ne? - el aliaj landoj.

1976-1986... En dek jaroj "L!" mirinde prosperis, preskaŭ triobligante sian abonombroon kaj sian jaran amplekson kun legantoj nun en 30 landoj. Kiom da motivoj por fieri, ĉu ne? Tamen fanfaroni estus stulte, ĉar ĝuste de modesto kaj nepretendemo dependis ĝis nun la sukceso de "L!". Pli ol la multaj laŭdaj vortoj, kiuj alvenas al la "Laŭtejo", kaj kiujn ja meritas la "gelaŭtuloj" mem, plej agrablas la konstato, ke en kaj ĉirkaŭ "Laŭte!" iom post iom kreiĝis varma etoso el komprenemo kaj amikeco trans asoci- kaj generaci-apartenoj.

Sojle de la jubilea jaro 1987 "L!" alportas tiel sian modestan sed konvinkan ateston pri la ĉiama valoro de la idealo, kiun flegis Zamenhof sub la nomo "interna ideo".

Tiu ĉi 69-a numero, kun pli nete internacia enhavo ol kutime, signu la komencon de ankoraŭ pli prospera periodo!

Salutas kaj dankas plej amike al ĉiuj gelaŭtuloj

Kribo.

UNUAFOJE MI INTERKOMUNIKIĜIS kun FREMDLANDANOJ  
per ESPERANTO

Laŭ informo de mia korespondanto sinjoro A. Lagoutte, karavano de francaj esperantistoj por la 71-a UK en Pekino estis 19/7 atingonta Kunming la ĉefurbon de nia provinco. Mi faru ĉion eblan por renkonti sinjorinon Maurin en ĝi.

Tre klare, por mi ne eblas partopreni universalan kongreson, eĉ nur en Pekino, sed realigeblas renkonti iujn en ne tiom distanca urbo. Se mi estus perdinta tiun ĉi ŝancon, probable alian mi havus neniam. Tial en tri tagnoktoj sendormaj mi faris ĉetempnan veturadon, serĉadon por pliaj informoj, kaj verdstelan paperflagon.

Ĝuste antaŭ la horo mi trovis du oficistinojn aranĝitajn de la turisma buroo de la urbo aparte por ĉi tiu karavano kiel franclingvajn ĉiĉeronojn. Ĉirkaŭ la 3a posttagmeze laŭtempe la aeroplano alvenis. La verdstela flago tuj distingis gesamideanojn de aliaj vojaĝantoj. Reĝprokis varmaj salutoj. Troviĝis ankaŭ s-ino Marin. Iuj fotis min kun la flago. Tuj oni iris al la hotelo VERDA LAGO per du busoj, en unu mi kunestis kaj parolis kun la sambusanoj. Dank'al Esperanto ni interkomprenis facile kvankam mi estas nur "vilaĝulo" de dezerta loko.

Ilia programo estis antaŭe aranĝita kompakta : post enhoteligo, vizito al la ORA TEMPLO, vespere film-spekto ; la 20an vizito al la ŜTONA ARBARO kaj vespere libera aranĝo ; la 21an, vizito al la OKCIDENTAJ MONTAJ kaj tagmeze veturo al la aerodromo por alia flugo.

Tiu karavano konsistis el 47 francoj kaj 2 finnlandanoj. Por ne ĝeni iliajn ripozetojn dum intervizitoj mi volis akompanon en vizitado. Tamen, bedaŭrege, malgraŭ mia sinteno sufiĉe disciplineca, tiu modesta volo malsukcesis pro la multjara konvencie senforma regulo.

Feliĉe el bedaŭre, la ununura libervespero pasis tre gaje. Ĉeestis ankaŭ tiuj de mi informitaj gesamideanoj : ekseldonisto de E-libroj, franclingva instruisto, junuloj ĵus finintaj la dujaran E-kurson en Yunnan-a Universitato. Ni, esperantistoj de tri landoj, kunsidante en la hotelsalono, jen grupiĝis je apartaj interparoloj, jen kunfotiĝis, plenaj de gajo kaj senĝeno, tre mirinde por ni modestaj ĉinoj. Por ne pliigi lacon de niaj gastoj ni finis ĉetempne tiun karesindan vesperon, al kiu tamen la francoj aldonis lastan programeron : regali nin per kosta trinkaĵo.

Tagmeze de la 21a, kune ni adiaŭis niajn karajn gastojn antaŭ iliaj busoj kun profunda amika beno : "Bonvojaĝon!".

Shao Shukang

DIMANĈON la 14-an de DECEMBRO  
en EYSINES (33)  
pasigu kun ni la ZAMENHOF-TAGON

Eblas alveni sabaton vespere. Ni proponas supon. Bonvolu kunporti manĝaĵojn por komuna vespermanĝo.

Por interesatoj :

Hotelo "LES ALIZÉS" kostoj : ĉambroj 1 granda lito... 195 FF  
15 av. St Médard 2 malgrandaj litoj... 220 FF  
33320 EYSINES matenmanĝo... 18 FF

Ankaŭ lokaj geE-istoj pretas gastigi vizitantojn loĝantajn malproksime.

Dimanĉon :

Ekde la 10-a h. : en "Maison de quartier LA ROSERAIE : konversacio laŭ libervolaj temoj.

12-a : honorvino laŭ invito de la loka Laika Amikaro.

12 h 30 : tagmanĝo (40 FF)

KUSKUSO  
Fromaĝo  
Kuko aŭ glaĉiaĵo  
Kafo aŭ teo

15 h : Distra varietea posttagmezo.... la volontuloj por animado bonvolu sin prepari kaj sin proponi.

Nomo :

Adreso :

Mi (Ni) pasigos kun vi la ZAMENHOF-TAGON la 14-an de decembro en Eysines.

Mi (Ni) alvenos sabaton kaj deziras tranokti en hotelo "LES ALIZÉS" en ĉambro kun ... litoj. Mi ŝuldas.....

Mi (Ni) alvenos sabaton kaj deziras tranokti ĉe geesp-istoj

Dimanĉa tagmanĝo 40 FF x ... personoj.....


SUMO.....

sendu vian aliĝilon plej eble frue al :

GISÈLE GIZARD, 39 av. de St Médard, 33320 EYSINES

tel. 56.28.89.20

## VIVO DE LA ĜIRONDIA GRUPO



### ILI DEZIRAS KORESPONDI KUN FRANC(IN)OJ

- \* Jens MERKER, Bautzener str.12, DDR-7500 COTTBUS. 21-jara studento por instruistiĝi pri geografio. Interesiĝas pri Esp., komputado, rock-muziko, legado.
- \* Antonia RORSA, Szekesfehiwas, Printer k.u. 12, 8000 HUNGARO. 24-jara statistikistino ĉe Videoton. Havas 4-jaran filon E-parolantan. Interesiĝas pri denaskas E-istoj, E-varbaro, literaturo.
- \* Thymea PULIUS, Botong u.5, H-6000 KESCKEMÉT. 15-jara E-isto. Ŝatas plantojn kaj bestojn. Kolektas poŝtmarkojn. Li ankaŭ violonludas, teatraĵojn prezentas, pilkludas.
- \* Cvjatko TODOROV, str. Vladajsko vastanie 20,11,43, BG-9701 u. SHUMEN 50-jara teknikisto, prezidanto de loka E-societo. prelegvojaĝis en Francio '83. Interesiĝas pri E-movado, esp. ĵurnalismo...

Tri kunvenoj okazis. 35 geesp-istoj (rekordo!) partoprenas la unuan en LARRAT la 13-an de septembro. En CENON-Palmer la 7-an de oktobro la grupo dankas al Joël LAJUS pro 8-jara sekretariado. Lin anstataŭas Jean-Luc BÉRARD kaj Marcel REDOULEZ. La temkunsido en GUJAN-MESTRAS spegulas sopiron de pluraj el ni al pli ofta E-etoso, -babilado. Tial al la kutima "labor"-kunsido ĉi-jare aldoniĝas monata kroma kunveno pritraktanta ununuran temon. La 18-an de oktobro ni parolis pri "PROPAGANDO".

Venontaj kunvenoj :

- Mardon la 18-an de novembro en Cenon-Palmer (19h) : grupkunveno
- Vendredon la 28-an de novembro en Cenon - Maison de quartier Georges Brassens (19h) : temkunveno pri ĈINIO (lumbildoj kaj debato)
- Mardon la 9-an de decembro en Cenon-Palmer (19h) : grupkunveno.
- Dimanĉon la 14-an de decembro en Eysines - Maison de quartier La Roseraie : ZAMENHOF-TAGO

Okaze de la kunveno en GUJAN-MESTRAS, la grupo decidis sendi al la Ministro pri Nacia Edukado poŝtkarton "Nous voulons apprendre l'Espéranto à l'école".

Temas pri bela poŝtkarto eldonita de GROUPE d'ACTION POUR L'ESPERANTO, 123 rue de Royan, 16170 ST YRIEIX. Ni proponas al la aliaj grupoj kaj simpatiuloj pri Esperanto sendi ĝin ekde la fino de januaro.

### POR EKFLUGO DE BALONOJ

La Ĝirondia grupo vendas ŝveligotajn balonojn kun surskribo "ESPERANTO Internacia lingvo", po 70 FF por 50 balonoj aŭ 130 FF por 100. Bonvolu mendi ĉe :  
 Simonne BERNARD, 171 rue Raymond Poincaré  
 33110 LE BOUSCAT

Urbo **CHAMBÉRY** decidis, laŭ klopodoj de la E-grupo, ke skvaro nomiĝos "SQUARE DOCTEUR ZAMENHOF". La E-grupo petas de la gekamaradoj ke ili sendu gratulleterojn al :  
 URBKONSILIO DE CHAMBÉRY, pere de Raymond Boré  
 481, rue du Bertillet, 73000 CHAMBÉRY.

Kompreneble, ju pli da tiaj leteroj ni povos amase transdoni, des pli la "imagfrapo" estos forta. Gesamideanoj, helpu nin! La tuta E-Grupo de Chambéry simple kaj sincere antaŭdankas vin.

Granda novaĵo ! Ni havas nun novan mesaĝilon, pli taŭgan, pli fidindan, malpli multekostan. KIEL UZI ĜIN ?

Faru 3615 ĉe la telefono.

Tajpu CTL (nomo de la nova servo)

Tajpu vian pseŭdonimon (la nomon, elektitan de vi, kaj per kiu la aliaj anoj korespondas kun vi).

Tajpu vian ŝlosilon (mot de passe - kodo, konata nur de vi, kaj kiu malpermesas al la aliaj legi viajn mesaĝojn).

Tajpu ESPERANTO. La E-mesaĝilo ekaperas. Vi povas tiam elekti la mesaĝojn laŭ la titolo.

Tajpu la numeron de la mesaĝo. Ĝi nun aperas.

KIEL SENDI MESAĜOJN ?

Tajpu BAL. Tio signifas "boîte aux lettres" - leterkesto. Tajpu la nomon de via korespondanto. Almenaŭ la unuajn literojn. Se estas pluraj - elektu laŭ la numero.

Tajpu la mesaĝon - kaj **ENVOI** por sendi ĝin. Baldaŭ aperos la listo de la pseŭdonimoj de E-istoj.

KIEL ANONCI INFORMOJN ?

Metu mesaĝon en mian leterkeston (ZORHOF). Mi tuj respondos al vi.

Vi povas ankaŭ esprimi sugestojn, dezirojn, proponojn.

Ĝi estas malpli multekosta : vi rajtas uzi la saman tempon CTL sur Teletel 2 (senpaga : oni pagas nur la komunikadon pere de la telefona reto) kiel vi uzis ĝin sur Teletel 3. Faru 3614 kaj tajpu CTCL anstataŭe.

Bonvolu... provi la sistemon kaj sendi al mi viajn sugestojn...

Antaŭdankon ! Zorhof.

### ILI DEZIRAS KORESPONDI KUN FRANCOJ

\* Josef ZAVURKA, Želinova 504, CS-286 01 ČASLAV. 30-jara instruisto. Interesiĝas pri E-movado kaj ties estonteco (se ĝi iam havos!), literaturo, vojaĝoj, fotografado...

\* Angela SCHUSTER, Buschower weg 3, DDR-1546 STAAKEN. 28-jara esperistino. Ekonomikistino. Interesiĝas pri sia fako, E-mondo...

\* Călin BUȚIV, Strada C. Porumbescu nr 2., BLB2 Scala A, Apartamento 6 RU-1900 TIMIȘUARA, Rumanio. 24-jara studento en plurteknika instituto. Interesiĝas pri E-movado, muziko...

## LA PATRO

Ĉar li loĝis en Batignolles-kvartalo, kiel oficisto en la ministerio de publika Instruado, li uzis ĉiumatene la omnibuson por veturi al sia oficejo. Kaj ĉiumatene li vojaĝis ĝis la centro de Parizo, fronte al junulino, al kiu li enamiĝis.

Ŝi veturis al sia vendejo, ĉiutage, je la sama horo. Ŝi estis brunulneta, el tiuj brunulinoj, kies okuloj estas tiel nigraj, ke ili aspektas kiel makuloj, kaj kies vizaĝkoloro havas eburajn rebrilojn. Li vidis ŝin aperi ĉiam en la angulo de la sama strato ; kaj ŝi ekkuris por atingi la pezan veturilon. Ŝi kuris kun mieneto urĝema, fleksa kaj gracia ; kaj ŝi saltis sur la piedbreton, antaŭ ol la ĉevaloj tute haltis. Kaj ŝi eniris la internon iom reakirante la spiron kaj, sidiĝinte, ĉirkaŭrigardis.

Kiam li unuafoje vidis ŝin, Francisko Tessier sentis, ke tiu vizaĝo treege plaĉas al li. Oni foje renkontas tiajn virinojn, kiajn oni ekdeziras fortege premi en siaj brakoj, tuj, ne konante ilin. Ŝi respondis, tiu junulino, al liaj intimaj deziroj, al liaj sekretaj atendoj, al tiu speco de ama idealo, kiun oni nescie portas en la fundo de l' koro.

Li obstine rigardis ŝin, kontraŭvole. Ĝenate pro tiu kontemplado, ŝi ruĝiĝis. Tion li rimarkis kaj volis deturni la okulojn ; sed li ĉiumomente revenigis ilin al ŝi, kvankam li klopodis fiksi ilin aliloken.

Post kelkaj tagoj, ili konis unu la alian ne parolinte. Li cedis al ŝi sian lokon, kiam la veturilo estis plena kaj supreniris al la imperialo, kvankam tio afliktis lin. Ŝi nun salutis lin per rideto ; kaj, kvankam ŝi ĉiam mallevis la okulojn sub lia rigardo, kiun ŝi sentis tro vigla, ŝi ne plu ŝajnis kolera esti tiel kontemplata.

Ili fine interbabilis. La rapida intimeco ekestis inter ili, intimeco de duonhoro ĉiutage. Kaj tio estis, certe, la plej ĉarma duonhoro en lia vivo. Li pensis pri ŝi la tutan ceteran tempon, revidis ŝin senĉese dum la longaj restadoj en la oficejo, obsedata, posedata, invadita per tiu bildo flosanta kaj tenaca, kiun vizaĝo de amata virino lasas en ni. Ŝajnis al li, ke la plena posedo de tiu personeco estus por li freneza feliĉo, preskaŭ supera al homaj realaĵoj.

Ĉiumatene ŝi nun manpremis al li, kaj li konservis ĝis la vespero la senton de tiu kontakto, la memoron en sia karno pri la malforta premo de tiuj fingretoj ; ŝajnis al li, ke li estas konservinta ties spuron sur sia haŭto.

Li malserene atendis dum la tuta cetera tempo tiun mallongan omnibusan vojaĝon. Kaj la dimanĉoj ŝajnis al li premaj.

Ankaŭ ŝi amis lin, sendube, ĉar ŝi akceptis, iun printempan sabaton, iri tagmanĝi kun li, en Maisons-Laffitte, la postan tagon.

\*

Ŝi estis la unua atendanta lin ĉe la stacidomo. Li miris ; sed ŝi diris al li :

"Antaŭ ol forveturi, mi havas ion por diri al vi. Ni havas dudek minutojn : estas pli multe ol ni bezonas."

Ŝi tremis, apogita sur lia brako, kun okuloj mallevitaj kaj palaj vangoj. Ŝi pluparolis :

"Vi ne faru eraron pri mi. Mi estas honesta knabino, kaj mi iros tien kun vi nur, se vi promesas al mi, se vi ĵuras al mi, ke nenion... ke nenion vi faros, kiu estus... kiu ne estus deca..."

Ŝi subite iĝis pli ruĝa ol papaveto. Ŝi eksilentis. Li ne sciis kion respondi, samtempe feliĉa kaj ĉagreniĝanta. En la fundo de sia koro, li eble preferis, ke tiel estas ; kaj tamen... tamen li lasis sin luli, dum la pasinta nokto, per revoj, kiuj metis fajron en liajn vejnojn. Li tutcerte malpli amus ŝin, se li sciis ŝin leĝerkondukta ; sed tiam tio estus tiel ĉarma, tiel ĝuoplena por li ! Kaj ĉiuj egoismaj kalkuloj de la viroj rilate al amo turmentis lian spiriton.

Ĉar li nenion diris, ŝi reekparolis per emociita voĉo, kun larmoj en la anguloj de la palpebroj :

"Se vi ne promesas al mi tute respekti min, mi hejmeniras."

Li tenere premis ŝian brakon kaj respondis :

"Tion mi promesas al vi ; vi faros nur tion, kion vi volos."

Ŝi ŝajnis senpezigita kaj demandis ridetante :

"Ĉu tio estas tute vera?"

Li rigardis ŝin en la fundon de la okuloj.

"Tion mi ĵuras al vi!"

- Ni prenu la biletojn", ŝi diris.

Ili preskaŭ ne povis paroli dumvoje, ĉar la vagono estis plenplena.

Alveninte en Maisons-Laffitte, ili iris al Sejno.

La varmeta aero moligis karnon kaj animon. La suno falanta

rekte sur la riveron, sur la foliojn kaj la gazonojn, ĵetis mil rebrilojn gajajn en la korpojn kaj en la spiritojn. Ili iris, man-enmane, laŭlonge de la bordo, rigardante la fiŝetojn, kiuj traŝovigis, grupe, inter du akvoj. Ili iris, inunditaj per feliĉo, kvazaŭ levitaj de tero en senmezura feliĉego.

Ŝi fine diris :

"Vi certe trovas min freneza."

Li demandis :

"Kial do?"

Ŝi pluparolis :

"Ĉu tio ne estas frenezo veni tiel sola kun vi ?

- Tute ne! Tio estas tute natura.

- Ne! ne! tio ne estas natura - por mi, - ĉar mi ne volas peki, - kaj tiel oni pekas, tamen. Sed se vi sciis! estas tiel malgaje, ĉiutage, la samo, ĉiujn tagojn de la monato kaj ĉiujn monatojn de la jaro. Mi estas sola kun panjo. Kaj ĉar ŝi havis tiom da ĉagrenoj, ŝi ne estas gaja. Mi faras, kion mi povas. Mi klopodas tamen ridi ; sed mi ne ĉiam sukcesas. Fine, malbone estas, ke mi venis. Almenaŭ vi ne koleras kontraŭ mi?"

Responde li rapide kisis ŝin en la orelo. Sed ŝi abrupte apartigis sin de li ; kaj subite kolera :

"Ho! Sinjoro Francisko! post tio, kion vi ĵuris al mi."

Kaj ili revenis al Maisons-Laffitte.

Ili tagmanĝis en Petit-Havre, en malalta domo, kaŝita sub kvar grandegaj poploj, ĉe la bordo de la rivero.

La libera aero, la varmo, la blanka vineto kaj la konfuzo senti sin unu apud la alia igis ilin ruĝaj, premataj kaj silentaj.

Sed post la kafo invadis ilin subita ĝojo, kaj trairinte Sejnnon, ili pluiris laŭlonge de la bordo, al la vilaĝo La Frette.

Subite li demandis :

"Kiel oni nomas vin?"

- Luiza."

Li ripetis : "Luiza" kaj diris nenion plu.

La rivero, formanta longan kurbon, iris bani en la malproksimo vicon da blankaj domoj speguligantaj kaprenverse en la akvo. La junulino plukis lekantojn, faris dikan kampan garbon, kaj li kantis plenbuŝe, ebria kiel juna ĉevalo, kiun oni ĵus metis en herbejon.

Maldekstre de ili, monteto plantita per vinberoj laŭiris la riveron. Sed Francisko subite haltis kaj restante senmova pro miro :

"Ho! rigardu", li diris.

La vinberoj ĉesis, kaj la tuta bordo nun estis kovrita de

floranta siringo. Tio estis violkolora arbaro! speco de granda tapiŝo sternita sur la tero, ĝis la vilaĝo, tie, je du aŭ tri kilometroj.

Ankaŭ ŝi restis mirigita, emociita. Ŝi flustris :

"Ho! kiel bela!"

Kaj traირinte kampon, ili iris kurante al tiu stranga monteto, kiu liveras, ĉiujare, ĉiujn siringojn tiratajn tra Parizo en la ĉaretoj de la foirvendistinoj.

Mallarĝa pado malaperis sub la arbustojn. Ili sekvis ĝin kaj, renkontinte etan maldensejon, ili sidiĝis.

Legioj da muŝoj zumis super ili, ĵetis al la aero mildan senĉesan bruadon. Kaj la suno, la granda suno de senventa tago, faladis sur la longan florantan monteton, eligis el tiu bukeda arbaro potenca aromon, grandegan blovon de parfumoj, tiu ŝvito de la floroj.

Malproksime sonoris preĝeja sonorilo.

Kaj, iom post iom, ili kisiŝ sin, kaj poste ĉirkaŭbrakis sin, kuŝantaj sur la herbo, senkonsciaj pri io alia, ol ilia kiso. Ŝi estis ferminta la okulojn kaj tenis lin en siaj brakoj, fortege premante lin, sen iu penso, perdinte la prudenton, inerta de la kapo ĝis la piedoj en pasia atendado. Kaj ŝi tute donis sin al ! nesciante, kion ŝi faris, eĉ ne komprenante, ke ŝi estis fordoninta sin al li.

Ŝi vekigis en la terurigo de la grandaj malfeliĉoj kaj ŝi ekploris, ĝemante, kun la vizaĝo kaŝita sub siaj manoj.

Li provis konsoli ŝin. Sed ŝi volis tuj ekiri, reveni, hejmeniri Ŝi senĉese ripetis, grandpaŝe irante :

"Dio mia! Dio mia!"

Li diris al ŝi :

"Luiza! Luiza! ni restu, mi petas vin."

Ŝi havis nun la vangojn ruĝaj kaj la okulojn kavaj. Tuj kiam ili estis en la stacidomo de Parizo, ŝi forlasis lin eĉ ne adiaŭante.

\*

Kiam li renkontis ŝin la postan tagon, en la omnibuso, ŝi ŝajnis al li ŝanĝita, malgrasiĝinta. Ŝi diris al li :

"Necesas, ke mi parolu al vi ; ni eliru ĉe la bulvarado."

Tuj kiam ili estis solaj sur la trotuaro :

"Necesas adiaŭi", ŝi diris. "Mi ne volas revidi vin post tio, kio okazis."

Li balbutis :

"Sed kial?"

- Ĉar mi ne povas. Mi estis kulpa. Tia mi ne plu estos."

Tiam li plorpetis, petegis ŝin, torturite per deziroj, frenezigitigite de la bezono tute posedi ŝin, en la absoluta senrezisto de la amornoktoj.

Ŝi obstine respondis :

"Ne, mi ne povas. Ne, mi ne volas."

Sed li vigligis, ekscitiĝis pli forte. Li promesis edzinigi ŝin. Ŝi diris denove :

"Ne."

Ŝi forlasis lin.

Dum ok tagoj, li ne vidis ŝin. Li ne povis renkonti ŝin kaj, ĉar li ne konis ŝian adreson, li kredis ŝin perdita por ĉiam.

La naŭan tagon, vespere, oni sonorigis ĉe li. Li iris malfermi. Estis ŝi. Ŝi ĵetis sin en liajn brakojn, kaj ne plu rezistis. Dum tri monatoj, ŝi estis lia amorantino. Li komencis tediĝi de ŝi, kaj jen ŝi sciigis al li, ke ŝi estas graveda. Tiam li havis nur unu ideon en la kapo : ĉesigi la rilatojn je kiu ajn kosto.

Ĉar li ne povis atingi tion, ne sciante kiel fari, kion diri, freneze maltrankvila, kun la timo pro tiu kreskanta infano, li alprenis gravan decidon. Li transloĝigis, iun nokton, kaj malaperis.

La bato estis tiel severa, ke ŝi ne serĉis tiun, kiu ŝin tiel forlasis. Ŝi ĵetis sin al la genuoj de sia patrino, konfesante al ŝi sian malfeliĉon ; kaj post kelkaj monatoj ŝi naskis bebon.

\*

Pasis jaroj. Francisko Tessier maljuniĝis kaj neniu ŝanĝigo okazis en lia vivo. Li ja monotone kaj morne vivadis kiel la burokratoj, sen esperoj kaj atendoj. Ĉiutage li ellitiĝis je la sama horo, iris en la samaj stratoj, pasis tra la sama pordo antaŭ la sama pordisto, eniris la saman oficejon, sidiĝis sur la sama seĝo, kaj plenumis la saman laboron. Li estis sola en la mondo, sola dum la tago, meze de siaj indiferentaj kolegoj, sola dum la nokto, en sia fraŭla loĝejo. Li ŝparis po cent frankoj en ĉiu monato antaŭvide al la maljuneco.

Ĉiun dimanĉon, li faris promenon en la Elizeaj Kampoj, por rigardi pasi la elegantan mondumon, la akompanantarojn kaj la belajn virinojn.

La postan tagon li diris al sia samsorta kunulo :

"La reveno de la Arbaro estis tre pompa, hieraŭ."

Nu, iun dimanĉon, hazarde, sekvinte novajn stratojn, li eniris Monceau-parkon. Estis hela somera mateno.

La servistinoj kaj panjoj, sidantaj laŭlonge de la aleoj,

rigardis la infanojn ludi antaŭ ili.

Sed subite Francisko Tessier ekstremitis. Pasis virino tenanta per la mano du infanojn : knabon proksimume dekjaran kaj knabinon kvarjaran. Estis ŝi.

Li iris ankoraŭ centon da paŝoj, kaj poste sinkis sur seĝon, sufokite per la emocio. Ŝi ne rekonis lin. Tiam li revenis, penante denove vidi ŝin. Ŝi estis sidiginta, nun. La knabo restis tre kvieta, apud ŝi, dum la knabineto ludis muldante teron. Estis ŝi, tutcerte estis ŝi. Ŝi havis seriozan aspekton de sinjorino, simplan veston, memfidan indan mienon.

Li rigardis ŝin de malproksime, ne kuraĝante alpaŝi. La eta knabo levis la kapon. Francisko Tessier sentis sin tremi. Estis lia filo, sendube. Kaj li rigardadis lin, kaj kredis rekoni sin mem tiam, kia li estis sur fotografiaĵo farita antaŭe.

Kaj li restis kaŝita malantaŭ arbo, atendante, ĝis ŝi foriris, por sekvi ŝin.

Pro tio li ne dormis la sekvantan nokton. Ĉefe lia penso pri la infano turmentis lin. Lia filo! Ho! se li estus povinta scii, esti certa ! Sed kion li estus farinta ?

Li estis vidinta ŝian domon ; li informiĝis. Li eksciis, ke ŝi estis edzinigita de najbaro, honesta viro severmora, kortuŝita pro ŝia mizero. Tiu viro, konanta la kulpon kaj pardonanta ĝin, eĉ agnoskis la infanon, lian infanon, tiun de Francisko Tessier.

Li revenis al Monceau-parko ĉiudimanĉe. Ĉiudimanĉe li vidis ŝin, kaj ĉiufoje invadis lin freneza, nerezistebla deziro preni sian filon en siaj brakoj, kovri lin per kisoj, kunporti lin, ŝteli lin.

Li kruele suferis en sia mizera izolo de maljuna fraŭlo sen amo ; li suferis neelporteblan torturon, korŝirate de patra korinklino el rimorso, el envio, el ĵaluzo, kaj el tiu bezono ami siajn idojn, kiun la naturo metis en la internaĵojn de la estaĵoj.

Li fine volis fari senesperan provon, kaj, alpaŝante al ŝi, iun tagon, kiam ŝi eniris la parkon, li diris al ŝi, starante meze sur la vojo, livida, kun la lipoj skuataj de tremoj :

"Vi ne rekonas min?"

Ŝi levis la okulojn, rigardis lin, eligis terurkrion, hororkrion kaj, ekkaptante per la manoj siajn du infanojn, ŝi forkuris, kuntrenante ilin post si.

Li hejmeniris por plori.

Pasis ankoraŭ monatoj. Li ne plu vidis ŝin. Sed li suferis tage kaj nokte, rongate, korodate de sia patra korinklino.

Por kisi sian filon, li estus mortinta, li estus murdinta, plenuminta ĉiajn laborojn, spitinta ĉiajn danĝerojn, provinta ĉiujn aŭdacojn.

Li skribis al ŝi. Ŝi ne respondis. Post dudek leteroj, li komprenis, ke li ne povas esperi cedigi ŝin. Tiam li alprenis senesperan decidon, preta ricevi en la koron revolveran kuglon, se necese. Li sendis al ŝia edzo kelkvortan bileton :

"Sinjoro,

"Mia nomo certe estas por vi kaŭzo de hororo. Sed mi estas tiel mizera, tiel ĉagrentorturita, ke mi havas esperon jam nur je vi.

"Mi venas peti de vi nur dekminutan interparoladon.

"Mi havas la honoron, ktp."

La postan tagon li ricevis la respondon :

"Sinjoro,

"Mi atendas vin mardon je la kvina."

\*

Suprenirante la ŝtuparon, Francisko Tessier haltis post ĉiu ŝtupo, tiom forte batis lia koro. Estis en lia brusto rapida bruado, kiel besta galopo, obtuza, fortega bruado. Kaj li spiris jam nur pene, tenante la manrelon por ne fali.

Ĉe la tria etaĝo li sonorigis. Servistino venis malfermi. Li demandis :

"Sinjoro Flamel.

- Estas tie ĉi, Sinjoro. Eniru."

Kaj li eniris burĝan salonon. Li estis sola ; li atendis konfuzegita, kvazaŭ meze de katastrofo.

Malfermiĝis pordo. Aperis viro. Li estis alta, severmiena, iom dika, en nigra redingoto. Mane li montris seĝon.

Francisko Tessier sidigis, kaj, per anhelanta voĉo :

"Sinjoro... Sinjoro... mi ne scias, ĉu vi konas mian nomon... ĉu vi scias..."

S-ro Flamel interrompis lin :

"Estas senutile, Sinjoro, mi scias. Mia edzino parolis al mi pri vi."

Li havis la indan tonon de homo bona, kiu volas esti severa kaj burĝan majestecon de honestulo. Francisko Tessier plu-parolis :

"Nu, Sinjoro, jen kio. Mi mortas pro ĉagreno, pro rimorso, pro honto. Kaj mi volus unufoje, nur unufoje, kisi... la infanon..."

S-ro Flamel ekstaris, alpaŝis al la kameno, sonorigis. La

servistino aperis. Li diris al ŝi :

- Venigu Luizon al mi."

Ŝi eliris. Ili restis vidalvide, mutaj, havante nenion plu por diri unu al la alia, atendantaj.

Kaj subite dekjara knabeto enkuris la salonon kaj rapidis al tiu, kiun li kredis sia patro. Sed li haltis, konfuzita, ekvidante fremdulon.

S-ro Flamel kisis lin sur la frunto, kaj diris al li :

"Nun kisu la Sinjoron, karulo."

Kaj la infano afable venis, rigardante tiun nekonaton.

Francisko Tessier estis ekstarinta. Li lasis fali sian ĉapelon, preskaŭ falonte mem kaj li kontemplis sian filon.

S-ro Flamel, pro delikateco, estis deturninta sin, kaj li rigardis tra la fenestro, en la straton.

La infano atendis, mirigita. Li relevis la ĉapelon kaj redonis ĝin al la fremdulo. Tiam Francisko, ekkaptante la etulon en siaj brakoj, komencis kisi lin freneze sur la tuta vizaĝo, sur la okuloj, sur la vangoj, sur la buŝo, sur la haroj.

La bubo, konsternita de tiu hajlo da kisoj, penis eviti ilin, deturnis la kapon, forpuŝis per siaj etaj manoj la avidajn lipojn de tiu viro.

Sed Francisko Tessier, abrupte, remetis lin sur la plankon. Li kriis :

"Adiaŭ! Adiaŭ!"

Kaj li forkuris kiel ŝtelisto.

(20-an de novembro 1883)

\*\*\*\*\*

## LA MESAĜO

La pordo kiun iu malfermis  
La pordo kiun iu refermis  
La seĝo kie iu sidigis  
La kato kiun iu karesis  
La frukto kiun iu mordis  
La letero kiun iu legis  
La seĝo kiun iu faligis  
La pordo kiun iu malfermis  
La vojo kie iu kuras ankoraŭ  
La arbaro kiun iu trairas  
La rivero kien iu sin ĵetas  
La hospitalo kie iu mortis.

## LA ĜARDENO

Miloj kaj miloj da jaroj  
Ne povus sufiĉi  
Por diri  
La etan sekundon da eterneco  
Kiam vi kisis min  
Kiam mi kisis vin  
Iun matenon en la vintra lumo  
En la Montsouris-parko en Parizo  
En Parizo  
Sur la tero  
La tero kiu estas astro.

Jacques PREVERT (1900-1977)  
el la franca : Daniel LUEZ

Lina GABRIELLI :

## MORTO DE BETT

Mi sidis ĉe la skribmaŝino kaj tajpis la lastajn vortojn de mia romano, kiam mi diris al li :

- Tamen, ni ne perfidis Bett !

Li tuŝis mian frunton kaj respondis :

- Ĉar vi havas cerbon.

Mi daŭrigis mian laboron. Nun mi kopiis frazon de Camus por la enkonduko. Estis frazo pri la ĉiam ŝanĝigantaj "valoroj" de la vivo, trovita en medicina revuo, kiun mi elportis el mia patrujo. Tiu frazo estis taŭga por la romano, kiun mi skizis rapide kaj kiun mi prilaboros akurate, kiam la hodiaŭaj emocioj mildiĝos kaj la racio kapablos klare kritiki.

Fariĝis kompleta silento. Mi ne rimarkis, ke Thorsen ne plu estis en la ĉambro, ĉar mi enprofundiĝis en la vortojn, kiujn mi sentis kiel miajn.

Subite mi aŭdis brueton kaj turnis la kapon. Tiam mi konsciis pri la eliro de Thorsen, ĉar li nun surmetis la plej bonan vestaĵon kaj havis la ĉapelon surkape. Li estis serĉanta kelkajn paperojn kaj estis preta por foriri.

- Kien vi iras ? - demandis mi.

- Bett fartas malbone. Mi akompanos ŝin al la kuracisto.

- Ĉu mi povas veni kun vi ?

- Venu !

Mi lasis ĉion : la blankan paperon en la skribmaŝino, la skribilon, la krajonan gumon, la medicinan revuon... Kaj mi aldonis nenion al la malhelverda pantalono el lodeno kaj al la bluzeto.

Mi alproksimiĝis al la aŭtomobilo, apud kiu staris Bett kun larmoj en la ruĝigintaj okuloj : tiuj naivaj okuloj el hel-lazura porcelano, neniam malgajaj, kelkfoje iom pensiĝintaj, kutime glataj, eble ĉar ili entenis nur la rebrilon de la etaj kaj grandaj zorgoj de la ĉiutago, sed neniun dramon.

Antaŭ kelkaj horoj mi estis vidinta ŝin malesperanta pro financaj malfacilaĵoj. Thorsen estis ŝin konsolanta :

- Nia amikino aĉetos la dometon de mia avo.

Kaj Bett pro mia jeso, ridetis.

Eĉ nun mi volus malpezigi ŝian suferon, pro tio mi diris :

- Ĉu vi volas la pilolon ? La homeopatan pilolon, kiu tiom bone efikis al vi ?

Sed Bett per gesto de la mano akompanis la diron :

- Ne, ho ne !



Ni povis interkompreniĝi nur per gestoj kaj vortetoj.

En la aŭtomobilo mi sidis apud Thorsen. Ŝi estis en la mezo. Kaj pro la fakto ke ŝi ploris pro akra doloro, mi tenis ŝin en miaj brakoj kaj klopodis trankviligi ŝin. Sed subite, ĉio ŝanĝiĝis. La kapo de Bett renversiĝis, la okuloj ruliĝis kaj montris nur la blankan parton, la subtilaj lipoj retiriĝis internen de la buŝo, la spiro ĉesis... Mi pensis, ke ŝi mortis, sed mi forpuŝis tiun penson. Mi volis alkröĉiĝi al la espero, ke ŝi nur svenis: "Se ni rapidos, injekto, taŭga injekto, revivigos ŝin!". Kaj Thorsen, vidante ŝin en tia stato, plirapidis la kuron kriante kun rauka voĉo du fojojn ŝian nomon: "Bett, Bett!". La dua filino, kiu sidis malantaŭe, restis senmova. Verŝajne ŝi ne konsciis pri la tragedio.

Kaj mi ripetadis al mi mem: "Injekto redonos al ŝi la konscion, revivigos ŝin... Madono, Jezuo, helpu, helpu al ŝi!".

Sed alia interna voĉo enmiksiĝis en mia malespera alvoko: "Nun li estas libera, libera, libera... Pasintan nokton, vi ne povis endormiĝi. Vi faris mil da kilometroj en la koridoro de la hejmo, ripetante al vi mem: mi devas foriri, mi devas forgesi, tio ne povas daŭri, mia Dio! Estas tro kruele por mi, maljuste por ŝi. Helpu al mi foriri, mia Dio!... Tiel vi preĝis kaj vi pravis. Sed nun? Tiu historio venis al sia konkludo per ŝia morto, kiun vi ne volis, pri kiu vi ne kulpas, kiun vi eĉ ne deziris. Ne estas pro vi, ke ŝi mortis. Do, vi ne plu bezonas fuĝi, forgesi... Thorsen povas esti via, leĝe via..."

Kaj mi penis forĵeti tiun voĉon, mi preĝegis, por ke Bett ne mortu! Estis terura lukto, senkompata, kiu tranĉis min interne, kiu tempestis en mia kranio: "Li estas libera, libera, libera!... Madono, Jezuo, se la veturilo pli rapidos, ni eble sukcesos savi ŝin!".

Ni alvenis al la unuaj dometoj de la vilaĝo. Thorsen elkuregis el la aŭtomobilo por reveni kun la kuracisto; kaj denove li elkuregis for dum Bett estis ankoraŭ en miaj brakoj. Kaj la kuracisto tuŝis ŝin kun trankvila kaj senpasia vizaĝo. Li diris kelkajn vortojn, kiujn mi ne komprenis:

- Mi estas eksterlandano.

Tiam li mutiĝis kaj malproksimiĝis. Tial mi trankviliĝis: "Bett ne tiom malsanas!".

Thorsen reaperis. Li metis pilolon en sian buŝon kaj en la mian. La filino singultis: "Panjo!".

Ni ĝisvenis ĝis alta konstruaĵo. Eliris el ĝi du-tri flegistinoj, kiuj elprenis Bett el miaj brakoj. Bett ŝajnis algluita al mi. Poste ili sternis ŝin sur la portilo por malsanuloj kaj sek-

igis siajn okulojn per la rando de la laborvesto. Bett kuŝis sur la blanka littuko, en verda mantelo, en brunaj ŝtrumpoj kaj ŝuoj. La kruroj estis iomete disigitaj laŭ la aŭtomobila pozicio. Ŝi ne moviĝis.

Miaj okuloj faris demandojn kaj la flegistinoj per gestoj informis min pri la morto de Bett.

Mi ne sciis, ke mi ne plu revidos ŝin, alie mi alproksimiĝus, eĉ akompanus ŝin en la internon de la konstruaĵo, ordigus la vestojn, donus kison kaj la lastan saluton. Bett montrigis ĉiam bona kun mi, malgraŭ mia amo por Thorsen!

Ni revojaĝis hejmen. Thorsen iris al la placeto malantaŭ la domo kaj starigis flagon. Mi restis for, iom malvarmiĝinta, tre ŝokita.

Dume alvenis la aŭtobuso de la lernejo kun la du pli junaj filinoj. La malgrandulino rigardis min defie: "Ho, kiam ŝi ne plu trovos la patrinon, ŝi ne plu interesiĝos pri mi!".

Fakte ŝi eliris el la hejmo kun larĝiĝintaj okuloj plenaj de larmoj. Kaj mi, ne posedante ŝian lingvon - nur la patro estis esperantisto, - ne povis paroli, konsoli, doni mian proksimecon!

Mi restis tie, en la stratangulo, sola kaj forgesita, ĉar temis pri tragedio, kiu apartenis al la familio, ne al mi! Ne estis loko inter ili por mi. Ili ne supozis, ke ankaŭ mi suferis. Thorsen englutis multe da trankviligiloj kaj sterniĝis sur la lito de la filo kaj estis ĉirkaŭita de la filinoj. Li ne serĉis min, ignoris min. Mi atendis unu geston, kiu ne alvenis. Eble li ne kapablis agi alimaniere. Eble la teruro pri la morto, pli ol la doloro, premeĝis lin entute. Eble li trovis ne dece interesiĝi pri mi antaŭ la aliaj. Eble... Eble... Mi ne sciis kion fari sub tiom da "ebloj". Kia ruliĝo de impresoj, de sentoj, de malcertecoj! Vera ĥaoso.

Ĉu foriri aŭ resti?

Ok tagojn daŭris la martiriĝo de la nescio pri mia rolo, pri miaj devoj. Mi helpis purigante, lavante la plankojn, la telerojn, la tasojn, ordigante la litojn. Dum la tago Björn, la filo, neniam ploris; sed matene mi trovis sur la tableto apud la lito malsekan naztukon. Se mi povus suferi kun ili, mi certe suferus nur pro Bett! Sed tiom sola, mi suferis pli pro mi ol pro ŝi pro la impresoj de forlasiteco. Ŝajnis al mi, ke nun Bett estas en la hejmo pli ol antaŭe. Ŝia figuro premeĝis min, esprimiĝis per la konduto de la gefiloj: "Si estas eksterlandano", ŝajnas al mi ke ili pensis. Neniam venis en mian kapon, ke ili eble atendis mian alproksimiĝon, ke ankaŭ

ili bezonis min. Pro la fakto, ke mi amis la patron, kaj ke ili sciis tion, ŝajnis al mi maldelikata ago fari la unuan paŝon... maldeca ago konsoli Thorsen...

Kio estis la vero ? Kie estis la ĝusto ? Mi ne sciis kion fari, kion diri...

Eble mi eraris retiriginte... ne ili!

Mi provis forkuri du fojojn, al la stacidomo, malproksima kvar kilometrojn de la hejmo... Post la dua kilometro, Thorsen aŭtomobile kaptis min kaj rekondukis min hejmen...

Fine venis la tago de la funebroj.

La domo pleniĝis de homoj, de floroj, de manĝaĵoj. Okazis festeno. Mi sidis en mia angulo, kvazaŭ freneziginta...

\*\*\*\*\*

### PARIS AT NIGHT

Tri alumetoj ekbruligitaj unu post la alia en la nokto  
 La unua por vidi vian tutan vizaĝon  
 La dua por vidi viajn okulojn  
 La lasta por vidi vian buŝon  
 Kaj la tuta mallumo por memori ĉion tion  
 Premante vin en miaj brakoj.

### LA BUKEDO

Kion vi nun faras knabineto  
 Kun tiuj freŝe plukitaj floroj  
 Kion vi nun faras junulino  
 Kun tiuj sekigintaj floroj  
 Kion vi nun faras bela virino  
 Kun tiuj velkantaj floroj  
 Kion vi nun faras maljunulino  
 Kun tiuj mortantaj floroj  
 Mi atendas la venkonton.

Jacques PREVERT (1900-1977)  
 el la franca : Daniel LUEZ

La deka vespere :  
 mi povus, normale,  
 aŭskulti la lastajn  
 informaĵojn de l'radio  
 Sed... mi ne kuraĝas :  
 por aŭdi pri kio ?  
 pri murdoj,  
 atencoj,  
 eksplodoj,  
 radio(ne!)aktiveco ?  
 Aŭ, por iom ŝanĝi,  
 pri l'murdo de Selin',  
 dektrijara knabin',  
 en urbeto de Francio ?  
 Ĉifoje, pardonon  
 mi petas : naŭzigas  
 miaj mens', oreloj,  
 stomako, eĉ ventro,  
 pro tiom da sango,  
 da sadismo, da sufero.

Kaj Ĉernobil' ?  
 Homoj cent mil,  
 minimume, spertos sekvojn  
 de l'"akcidento" - kvankam  
 ĉu ne,  
 la elstaraj teknikistoj,  
 ĉie kaj nepridubeble,  
 regas (preskaŭ) perfekte, jam,  
 la mirindan,  
 la nepre ne malhavendan  
 atoman  
 energion.  
 Se iuj ridemas, ja certe  
 tiuj nun estas  
 la Diablo, kaj Plutono,  
 pro l'malbono  
 farita de l'homo sapjens  
 de si al si, ne nur  
 tra l'nunaj viktimoj,  
 sed - eĉ pli sence -  
 tra l'postaj generacioj,  
 ĉe kiuj  
 abortoj, kanceraj, monstraĵoj

neniel estos pruveble  
 kaŭzitaj oficiale  
 de teknika neregado  
 en Ĉernobil,  
 - Kremalvil,  
 Harisburg, Fesenhajm' ? -  
 ie ajn en la mondo.  
 Ĉivespere mi hezitas :  
 kion mi pli bedaŭru ?  
 Ĉu la doloron de l'patrin'  
 de Selin',  
 kiun strangolis... nu, kiu?  
 Plenmistere  
 oni plu enketas ;  
 sed mortinta  
 ŝin retrovis knabo.  
 Se l'terglobo  
 anonciĝus eksplodonta,  
 por la gepatroj, amikoj,  
 ĉu horor' pro homa frenezeco  
 pli premegus ilin  
 ol la dolor'  
 nuna  
 pro l'efektiva mort'  
 de knabino  
 tiel juna ?  
 Ĉie morto, perforto.  
 Eble ankaŭ ŝi, kiel  
 lernantinoj miaj,  
 timis tiun mondon  
 sen estontec', sen sekurec',  
 regatan de morto  
 kaj perforto.  
 Nun, ŝi ne plu timu.  
 Ŝi ripozu por ĉiam,  
 kaj spertu nek  
 kanceron, nek  
 atombombon,  
 tro malfruan timkoŝmaron  
 de l'homaro.

20an de majo 1986.

Vera Sinort.

### ALAŬDO

Neniam mi vidis alaŭdon kaj vane mi ellitiĝas aŭrore. Alaŭdo estas birdo ne tera.

De hodiaŭ frumatene mi tretas plugejojn kaj sekajn herbojn.

Aroj de grizaj paseroj aŭ brile farbitaj kardeloj ŝvebas super la dornaj heĝoj.

En oficiala vesto, garolo revuas la arbojn.

Koturno tanĝas la luzernojn kaj ŝnurostrekas la rekton de sia flugo.

Malantaŭ paŝtisto, kiu pli bone ol virino trikas, ŝafoj sekvas kaj similaj unuj la aliajn.

Kaj ĉio sorbas lumon tiel novan, ke pri la korvo aŭguriganta nenion bonan oni nur mokridetas.

Sed aŭskultu, kiel mi aŭskultas.

Ĉu vi aŭdas ie ĉisupre pisti kristalpecojn en ora kaliko ?

Kiu povas sciigi min, kie kantas la alaŭdo ?

Se mi rigardas ĉielen, suno bruligas al mi la okulojn.

Ekvidi ĝin rezignu mi.

Ĉiele vivas alaŭdo kaj el la birdoj ĉielaj sole ĝi kantas ĝis ni.

### ALCIONO

Fiŝoj ne kaptiĝis hodiaŭ vespere, tamen mi kunportas raran emociion.

Dum mi tenis horizontala mian hokfadenan stangon, alciono sur ĝin eksidis.

Pli brilan birdon ni ne havas.

Ĝi similis dikan bluan floron pinte de longa tigo. La stango fleksiĝis sub la pezo. Mi jam ne spiris pro la fiero, ke alciono kredis min arbo.

Kaj mi certas, ke ne pro timo ĝi deflugis, sed ĝi kredis, ke ĝi simple pasas de branĉo al alia.

### VERMO

Jen estas unu, kiu eletendas sin kaj longiĝas kiel bela nudelo.

### KOLUBRO

El kies ventro falis tiu kolikaĵo ?

### ARANEO

Eta maneto, nigra kaj kaj vila, stringanta harojn.

### PAPILIO

Tiu amletereto duige faldita serĉas adreson de floro.

### LA SKAPOLO

El aprila suno restis nur rozaj rebriloj sur senmovaj nuboj, kvazaŭ enhaveniĝintaj. La nokto leviĝis el la grundo kaj iom post iom vestis nin, en tiu eta maldensejo, kie mia patro atendadis la skopolojn.

Starante apud li, mi klare distingis sole lian vizaĝon. Pli ol mi alta, li apenaŭ vidis min kaj la hundo blovis, nevidebla ĉe niaj piedoj.

Turdoj hastis al la arbaro kaj merlo ĵetis sian gorgan krion, tiun specon de heno, kiu estas al ĉiuj birdoj ordono, ke ili silentu kaj dormu.

Skopolo baldaŭ lasos sian ŝirmejon el sekaj folioj kaj flugos supren. Kiam estas varmete, kiel estis en tiu vespero, ĝi prokrastas reiri al la ebenaĵo. Ĝi rondflugas super la arbaro kaj serĉas al si kunulon. Oni divenas, laŭ ĝia mallaŭta voko, ke ĝi proksimiĝas aŭ foras. Ĝi pasas per peza flugo inter la dikaj kverkoj kaj ĝia longa beko pendas tiel malalte, ke ŝajnas ke ĝi promenas en la aero kun eta irbastono.

Dum mi aŭskultis kaj rigardis ĉiudirekte, mia patro subite pafis, sed ne sekvis la hundon, kiu impetis.

- Ĉu vi maltrafis ? mi demandis lin.

- Mi ne pafis, li diris. Mia fusilo ekpafis sola en miaj manoj.

- Sola ?

- Jes.

- Aĥ!... ebla branĉo ?

- Mi ne scias.

Mi aŭdis, ke li formetas la malplenan kartoĉon.

- Kiel vi tenis ĝin ?

Ĉu eble li ne komprenis ?

- Mi demandas vin, kien celis la tubo ?

Ĉar li jam ne respondis, mi ne kuraĝis paroli plu. Fine mi diris :

- Vi povus mortigi... la hundon.

- Ni foriru, mia patro diris.

---

La sprito de Sacha Guitry :

\* *Kio probable ĉion falsas en la vivo, tio estas, ke oni estas konvinkita diri la veron, pro tio ke oni diras kion oni opinias.*

## Dankon...

Ci venis al mi kaj mi akceptis cin,  
Ci diris ĉion kion ci volis diri,  
Mi aŭskultis cin plejeble bone kaj plejeble bone respondis,  
Por ci mi staris tie, sed ankaŭ por multaj aliaj.  
Ŝatante min, ci donis sencon al ĉiuj miaj ŝarĝoj,  
Al ĉiuj miaj diroj.

Kiu el ni ŝuldas al la alia ?

Ci venis al mi kaj mi malfermis la pordon,  
Ci kvietigis cian soifon kaj kontentigis cian malsaton.  
Ci trovis ĉi tie la necesan ĉeeston, sed ĉu, enirante,  
Ne esperis ci ke al cia atendo mi povos respondi,  
Kaj ke ci povas fidi al mi ?

Kiu el ni ŝuldas al la alia ?

Ci venis en la mondon kaj mi edukis cin.  
Mi konis la timzorgojn, kaj angoron, kaj amon,  
Mi estis nur Mi, kaj ci ŝaris el mi patron,  
Kiom da fojoj mi timis perdi cin ?  
Kiom da fojoj ci helpis min vivi ?

Kiu el patro aŭ filo ŝuldas dankon ?

Ci, la hazarde iranto, survoje renkontita,  
Ci, kiu frapas mian pordon kiu malfermiĝis,  
Ci, kiun mi nomas "filo" kaj kiu nomas min "patro",  
Kio mi estus hodiaŭ se vi mem ne estus estintaj ?  
Ĉu mi ne devas danki vin ĉiujn  
Ĉar mi ne restis al vi indiferenta,  
Ĉar vi ne lasis min al mia silento ?

J.G.

el la franca tradukis M. Maurin.

La spirito de Sacha Guitry :

\* Unu el la plej fruktodonaj, plej interesaj kaj krome plej facilaj mensogoj estas tiu, per kiu oni kredigas al iu, kiu mensogas al oni, ke oni kredas lin.

\* Suspekti la maljunulojn, kiuj diras : "Lokon al la junuloj!"  
Ili ja foriru, se ili tiom ŝatas la junulojn !

Nu, estas rimarkinde, ke kiuj diras "Lokon al la junuloj!",  
tiuj proponas al ili nur aliulan lokon.

\* Optimisto : - Ŝi malfruas ; ŝi do venos.



NI,  
HOMOJ  
DE LA

19a JARCENTO

Tial ke mi naskiĝis en 1900, lasta jaro de la 19a jarcento,  
mi diras, ke mi apartenas al tiu jarcento, kvankam fakte mi  
vivis kaj vivas en la 20a.

"Tiu stulta 19a jarcento", iam diris fama rojalista pamfletisto.  
Stulta, kial ? Tial ke la homoj en tiu epoko atendis pli kaj pli  
feliĉan estontecon dank'al la senfina progreso de scienco kaj tekniko,  
kaj entute fidis al racio. Forĵetante la restaĵojn de la mezepoka mistiko,  
ili estis la heredantoj de la filozofoj de la 18a, la "jarcento de lumoj",  
de Kartezio kaj Lejbnico en la 17a, de la humanistoj de la Renesanco 16a,  
kaj tra ili de la antikvaj grekaj saĝuloj.

Nun la bela revo ne efektiviĝis, la iluzio forvaporigis, la espero  
fiaskis, ĉio ŝajne pravigas la juĝon de nia pamfletisto. Reage (kaj reakcie),  
la racio fariĝis eksmoda, kaj refloras la mitoj, la mistikoj : religioj,  
sektoj, astrologio, okultaj "sciencoj", fiaj ideologioj sin apogantaj  
sur malbone digestitaj "sciencoj" aŭ pseŭdosciencoj. Ĉu prave ?  
Ĉu vere la 19a jarcento estis stulta ?

Tamen el la laboratorioj de tiamaj serĉistoj fontis la novaĵoj,  
kiuj transformas nian mondon en akcela rapido. Iliaj eltrovoj anoncis,  
preparis, skizis aŭ komencis la konkerojn de la moderna tekniko,  
kiujn ni nun ĝuas. Sendube la efikoj ne ĉiam estas dezirindaj,  
kaj iuj samideanoj prave proponis la temon "la tekniko kontraŭ la vivo".  
Sed kiu kulpas ? Ĉu la scienculoj, kiuj havigis al ni tiujn novajn  
potencajn rimedojn ? aŭ ni, kiuj ne scipovis ilin racie uzi kaj prudente mastri ?

En la 19a jarcento naskiĝis la vapormaŝinoj, la fervojoj, la aŭtomobiloj,  
la aernavigado, la telegrafo, la telefono, eĉ la radio, la fonografo,  
la kino... En la lastaj jaroj de tiu jarcento oni komencis dissekci la  
atomon, kaj oni ekvidis la relativecon. Ne nur en sciencoj kaj teknikoj,  
ankaŭ en la artoj eksplodis revolucio, kiu nun pludaŭras.

Se mi intencus listigi la grandajn klerulojn, teknikistojn, artistojn,  
pensulojn de tiu epoko, certe mi forgesus multajn

nomojn. Sed mi ne forgesus, ke en tiu jarcento Zamenhof ekvivigis esperanton.

Ĉu ili estis stultaj, tiuj grandaj antaŭuloj, kiuj forĝis por ni tiel efikajn ilojn ? aŭ ĉu ni mem, malfidelaj heredantoj, malbonaj metilernantoj, kiuj fuŝe uzas tiujn ilojn ? Ili kreis tiun potencon ilaron por la feliĉigo de la homaro. Se ni ne kapablas ĝin utiligi por atingi tiun celon, ni kulpigu nin mem, ne ilin.

#### Pri "novaj" artaj formoj

Mi aludis pri revolucio en la artoj (romantismo, "faŭvismo", impresionismo...) sed krome estas fenomenoj ĝenerale rigardataj kiel freŝdataj, nome la bildostrioj kaj la sciencfikcioj. Nu, bildostrioj jam aperis en Germanio kun Wilhelm Busch, humorista desegnisto kaj poeto, en Francio kun la famaj serioj "Sapeur Camembert" kaj "Famille Fenouillard". Kaj pri la sciencaj fikcioj : sen retroiri ĝis la fabeloj de Voltero, la fantazioj de Cyrano de Bergerac aŭ la utopiistoj de la 16a jarcento, ĉu ne Jules Verne estis la vera patro de tiu literatura formo ? Ĉu ne skizis ĝin Victor Hugo en la lastaj poemoj de la Legendo de la Jarcentoj ?

#### NUNTEMPAJ OKAZOJ

Ni vivas strangan epokon. Ĉiu mateno alportas informojn pri atencoj al la homa vivo. Ĉiutage tie aŭ tie ĉi, senkulpaj homoj kaj infanoj suferas kaj mortas per bomboj de blindaj teroristoj aŭ de same blindaj militistoj.

Dume, ĉefmurdistoj (kolonelo-diktatoro, demokratia prezidento) estas aklamataj de multegopaj popolamasoj en siaj respektivaj landoj, kaj aprobataj de multaj homoj en aliaj.

Mi pensas pri vortoj de Ejnŝtejn : "Du aferoj havigas ideon pri infinito : la universo kaj la homa stulteco. Kaj koncerne la universon, ne estas tute certe..."

#### FREŜDATAJ INFORMOJ

Post sinsekvaj fiaskoj de amerikaj kaj eŭropaj raketoj, usonaj fabrikistoj de satelitoj sin turnas al Ĉinio por surorbitigi siajn aparatojn. Tiel la Ĉinoj, tradiciaj inventintoj de raketoj, rapide atingis la nivelon de la okcidentanoj, kaj restas rekonataj majstroj en tiu arto.

Ŝajnas, ke ankaŭ en la internacilingva movado, nun Ĉinio rapide progresas. Jam kun pli ol 1800 aliĝoj la Pekina kongreso anonciĝas kiel plej impona el la ĝisnunaj ekstereŭropaj kun-

venoj de esperantistoj. Tio estas kvazaŭ raketo kunportanta sateliton, kiu dissendos al tutmondo la pacan mesaĝon de esperanto. Ni gratulu kaj danku niajn ĉinajn amikojn.

#### ANALIZA GRAMATIKO (13)

#### La refleksivo (E)

\*\*\*\*\*

PRECIZIGOJ en la kadro de la FUNDAMENTA REGULO :

a) "Si" kaj "sia" resendas al la subjekto, sed ne povas esti subjekto. Ekzemploj :

Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto (Z).

En ĉiu kranio estas ĝia opinio.

b) Verbaj aŭ participaj substantivoj efikas kiel verboj rilate al la posesivoj. Ekzemploj :

Ŝi atingis la depostenigon de ŝia nevo (= Ke oni depostenigis ŝian nevon) - Li faris uzon de sia aparato kaj de sia aŭdaco. (Li uzis sian aparaton kaj sian aŭdacon) - La aŭtoro mokus la legantojn de liaj verkoj. (= Li mokus tiujn, kiuj legas liajn verkojn). - Ili mortigis la mortiginton de sia patro. (= Tiun, kiu estis mortiginta sian patron.) - Ili mortigis la mortiginton de ilia patro. (= Tiun, kiu estis mortiginta ilian patron.)

c) En alivorta ripeto ripeto de la sama objekto (akuzativo), refleksivo rilatas al la subjekto. Ekzemplo :

Ili forlasis la Eternulon, sian Dion. (= Ili forlasis sian Dion, la Eternulon.)

d) "Sia", sen subkompreno de alia verbo, ne povas montri apartenon al komplemento. Ekzemploj :

Metu ĉion en ĝia loko. - Al ĉiu sanktulo (vi donu) lian kandelon.

e) Refleksivo en la voĉo faktitiva.

Ĉe la verboj kun la sufikso "-ig" post radikoj transitivaj al substantivoj (ne al infinitivo) dusubjektaj, oni uzas la refleksivon nur rilate al la subjekto de igi aŭ fari, ĉar ili esprimas unu solan konceptan tutaĵon. Ekzemploj :

Li sendigis pakaĵon al sia amiko. (= Li faris, igis, ke oni sendis pakaĵon al lia amiko.) - La abatino lernigis al ŝi ŝiajn novicinajn preĝojn. (= La abatino faris ke la novicino lernis siajn preĝojn.)

Post aliaj radikoj (netransitivaj, substantivaj aŭ adjektivaj), "-ig" ne havas apartan efikon. Ekzemploj :

Ili sidigis lin inter si. - Li pendigis sin de sia figarbo. - Li paroligis pri si kaj pri sia invento en sia lando kaj ekster ĝi. - La fajro vitrigis la sablon per sia efiko. - Ŝi beligis sin per siaj kosmetikaĵoj.

f) Simile okazas kun la verbo "lasi" kaj alia en infinitivo. Kiam la dua estas netransitiva, la vortordo ne ŝanĝas la signifon, ĉar nur la verbo lasi povas havi objekton. Ekzemploj :

Lasi fali la manojn (Z) = Lasi la manojn fali. - Lasu la infanojn veni al mi. = Lasu veni al mi la infanojn.

Kiam ambaŭ verboj estas transitivaj, nur la vortordo montras al kiu predikato rilatas la objekto. Ekzemploj :

Eĉ inter la garboj lasu ŝin kolekti (Z). (Kolekti ne ŝin, sed la spikojn.) - Lasu kolekti ilin (la spikojn) inter la garboj. - La bruo ne lasis aŭdi lin. - La bruo ne lasis lin aŭdi (la respondon).

Por uzi refleksivon rilate al la subjekto de lasi oni devas meti ĉiam la verbon lasi kaj la alian kunaj, formantaj tutaĵon. Ekzemploj :

Ŝi lasis peli sin de la ondoj, kiel ili volis.(Z) - Ĉu mia alte fluganta spirito devas lasi alligi sin per ĉeno? (Z).

Ekzemploj sen refleksivo rilate al "lasi" :

Lasu min dormeti.(Z) - Ili lasis la infanojn rakonti siajn aventurojn. - Ŝi lasis ilin lavi sin en la ĝardeno.

FINO

L. Mimó

Pri la verko de M.T. LLOANCY "Esperanto et jeu de mots dans l'oeuvre de Raymond Schwartz (1894-1973) : Sekve de la informo aperinta p.32 de la septembra L!, la verkintino atentigas, ke la resumo (en la franca lingvo kaj esperanto) kun ĝenerala bibliografio estas jam disponebla kaj mendebla kontraŭ 18 FF, dum la kompleta disertacio (verkita nur en la franca) estas nur aperonta. Ĝin oni do povas jam antaŭmendi per 150 FF (+ sendkostoj : 20 FF) al la verkintino. Dankon al tiuj, kiuj jam mendis aŭ antaŭmendis !

Por mendi la Kalendaron de S.I.A. (vd. L! n-ron 67 sur la lasta paĝo!) Bonvolu noti, ke vi povas ĝiri al jena poŝtkonto : S.I.A., 1230.50 S Toulouse, Francio.

## Raporto pri vojaĝo en NIKARAGVO

(januaro, februaro, marto 1986)

### Januaro. Matagalpa, centra montara regiono de Nikaragvo.

Sur la ŝtoneta kaj dekliva tero, kie balanciĝas nia malnova ŝarĝveturilo, mi pensas pri la antaŭa jaro. En tiu ĉi gastigema regiono de produktema vegetaĵaro okazis bataloj inter kontraŭrevoluciuloj (ni diros kontraŭuloj) kaj, aliflanke, la Sandinista armeo kaj la rikoltantoj de kafofrukto. Kiel estos tiun ĉi jaron ? La kontraŭuloj ? Ili estas batalantoj pagataj de C.I.A., plimulte nostalgiuloj de la antaŭa diktatoro Somoza. Ili atakadas ĉefe la kampanan loĝantaron. La kafokulturo, esenca por Nikaragvo, alportas du trionojn el la devizaj enspezoj kaj mobilizas, ĉiujare, kampanojn, memvolajn studentojn kaj ŝtatoficistojn por anstataŭigi la laboristojn mobilizatajn por la defendo. Ankaŭ pro tio venis ni, centoj da memvoluloj el Norda Ameriko, Francio, Italio, Hispanio kaj Svisio, sur tiun ĉi ejon nomitan "Santa Celia".

La kampanoj ĝoje akceptas nin, sed iomete maltrankvile pro la kvanto de la venantoj. Ili estas trideko da familioj loĝantaj apud la tero en lignaj kabanoj. Sur la monteto, kiu superstaras, estas la unika cement-konstruaĵo, antaŭe loĝejo de la bienposedinto, kiu fuĝis en '82. Nun tiu ĉi domo estas utiligata kiel vartejo por la malmulte aĝaj infanoj dum la gepatra laborado. Kelkaj virinoj el la komunumo, direktataj de bebzorgadistino, pure kaj atente zorgas pri tiuj estontuloj. Nek tio nek la lernejo ekzistis antaŭ la revolucio de 1979, kiu forpelis diktatoron Somoza. Nun, ĉi tie, la bieno apartenas al la ŝtato kaj estas direktata de la kampanoj kun la agrikulturaj konsilistoj. Ekzistas ankaŭ privataj bienposedantoj, kondiĉe ke ili respektu la sociajn leĝojn. Je la 7a horo, en la kafarboj, multegaj manoj senĝrajnigas la ruĝajn fruktojn. Kelkaj kampanoj, armitaj, certigas la protekton. Tagmeze oni elirigas la unuajn sakojn surdorse ŝarĝitajn. Sur la malebena kaj glitiga tereno malfacile estas vojiri por ni. Kion diri pri tiuj virinoj kaj infanoj ? Menuo : rizo, ruĝaj fazeoloj, maiza platkuko, ĉio akompanata de malvarmeta maiza trinkaĵo. Glutinte la manĝon bonhumore en duonhoron, ni revenas al kafarbetaro. La rikoltado estas agrabla, ĉar ni havas la ombron de la arboj sed estas iomete teda. Tamen oni multe ridas en la vicoj. Je la 15a, korna sono : estas la pesado. Certe ni estas iomete ridindaj kun 3 "latas" (unu "lata" estas 12 litroj), kompare al la 7 "latas", meznombro de

la rikoltaĵo de la kamparanoj. Oni devas diri, ke ili estas pagotaj laŭ produkto-kvanto. Pro tio ili rezervas por si la plej ŝarĝitajn vicojn. Logike : estas multnombra ĉiu familio.

Je la 18a venas la krepusko kaj la malvarmeto, dum ĉiuj finas la tagajn taskojn (tualetoj, lesivo, en la torento). La vespermanĝo estas ĉiam sama por ĉiu manĝo kaj ĉiu tago de la jaro. Tiu baza nutraĵo de la manĝdomo estas senpaga. Estas popola butikoj, kie oni povas aĉeti (kiam estas) malmultekostajn nutraĵojn, vestaĵojn kaj tualetajn aferojn. Hodiaŭ vespere estas vakcinado kaj la vizito de la kuracisto. Ankaŭ tio estas akiro de la revolucio. Flegistino loĝas je du kilometroj. Vespere oni rigardas la televid-felietonon sur la unika aparato de la komunumo. Oni frue enlitiĝas, ĉar oni ellitiĝas matene je la 5a. Sabate vespere kaj dimanĉe estas la malstreĉo. La viroj ludas bazopilkon. Oni venas aŭskulti la biblian parolon kaj poste estas la festo per kelkaj gitaroj kaj "rancheras" (melankolia kanto, kies temo estas la taga vivo kaj la amo), dum kelkaj anoj kun armiloj certigas sekurecon. Per tio la kafo-rikolto de 1986 estis sukceso kaj ne estis mortintoj.

Kiel aliloke la kampara mondo en Nikaragvo estas diversa. En la norda ebenaĵo estas la kotona kulturo, kies rikoltado okazas ankaŭ dum la unuaj monatoj de la jaro. Mi (sola) aliĝas al la rikoltantoj de la Kooperativo Gilberto Sastran Berbis apud urbo Leon. Kelkaj cement-konstruaĵoj kvadrataj staras. Ankaŭ tie, en la domo de la antaŭa bienposedinto vivas pluraj familioj. La bieno : 210 hektaroj, el kiu kvar kvinonoj por la kotono, la restaĵo por la maizo, kelkaj bovinoj, tri traktoroj kaj aliaj posttreniloj aŭ iloj de la kampo (kotona kulturo bezonas multajn zorgojn) - apartenas al 13 societanoj kun iliaj familioj. Ĉi tie oni vivas iomete pli bone : nutraĵo pli ekvilibra, proksima sanitara servo, lernejo konstruita per svedia financa helpo, kie vespere okazas kursoj por alfabetigo de plenkreskuloj, sed ĉefe oni laboras sen armiloj (ili restas hejme) ĉar la kontraŭ-uloj ne venas tien en la ebenaĵo. Tio ne signifas indiferentecon al la aliaj kamparanoj. Ĉiuj societanoj laŭvice iras dum kelkaj monatoj al montaro kun rezerva armeo. Nikaragvo havas kelkajn kotonrikoltajn maŝinojn, ĉefe en la privataj bienoj, sed ĉi tie ne estas. La rikolto komenciĝas, kiam ektagiĝas por ke oni profitu de la malvarmeto, ĉar ekde la 10a la suno ĉion bruligas. Pro tio oni devas tute vestiĝi. Oni suferas soifon kaj polvon. La labora tago finiĝas je la 16a. La rikoltantoj estas ĉefe virinoj aŭ maturiĝantoj el la proksima vilaĝo. Tio estas aldono al la familia enspezo.

**Meze de februaro**, grupo de kristanoj eliras el Jalapa (norda urbeto ĉiam atakata de la kontraŭ-uloj) por "kruca vojo" (religia paŝado) 300-kilometra ĝis Managua. La kristanoj estas 95 procentoj el la Nikaragvanoj. Mi akompanis la paŝadon kelkajn tagojn. En la grupo estas Miguel d'Escoto, pastro kaj ministro de la fremdaj aferoj, deko da junuloj invalidoj de la nuna milito sur siaj ruliĝantaj foteloj, eĉ kelkaj infanoj kaj maljunuloj. La kialoj de tiu ĉi kruca vojo estas aserti, ke - la popolo de Nikaragvo volas la pacon ; - la kristanoj estas implikitaj kun la revolucia procezo.

En la nuna Nikaragvo estas la religia libero. (Ĉar Reagan senkulpigas la kontraŭ-ulajn agojn pro la manko de liberoj ĉefe religiaj en Nikaragvo). La religia hierarkio devas voki kontraŭ la agreso, pro kiu multe suferas la popolo. Ĝis nun ĝi ne faris tion.

Ĉiu stadio simbolas momenton de la kristo-pasiono. En ĉiuj stadiaj urboj homamasoj el kamparanoj, el kristanaj komunumoj, atendas la paŝadantojn por soleni la diservon kaj pensi pri la rolo de la kristanoj en la socio. Poste, ili akceptas ilin por la loĝado kaj la manĝoj, fine akompanas ilin dum kelkaj kilometroj al proksima stadio. Nur unufoje la paŝadantoj estis malakceptataj de pastro (amiko de la religia hierarkio de Managua), kiu fermis sian preĝejon per pikdrato. De kie venas la religia subpremo ?

**Rio-Blanko**, ekstrema limo de la regiono de Matagalpa, tute apud la arbaroj kaj la marĉoj de la atlantika marbordo.

Tradicia regiono de bredado, ne multe koncernata de la revolucio de '79. Ĉi tie ludas taga influo-batalo inter la partianoj de la revolucio kaj de la kontraŭ-uloj. Mi vizitas amikon, memvolan francan kuraciston de unu jaro en la loka san-centro. Tiu ĉi centro estis konstruita post la revolucio, antaŭe estis nenio. Ĝi servas al 50 000 loĝantoj de la regiono, arigas 3 kuracistojn, 2 flegistinojn, 5 helpflegistinojn, 1 laboristino, 1 farmaciiston kaj 2 sanitarajn edukistinojn (plimulte Nikaragvanoj) kaj havas 2 sanitarajn veturilojn. Ĝi donas 70 konsultadojn ĉiutage (senpagajn), devigan vakcinon antaŭ iu ajn konsultado. Estas medicina sliparo. Malgraŭ la malsufiĉo de kuraciloj, la mortokvanta procento malaltiĝis de 120 ĝis 75 po 1000.

Hodiaŭ, mi iras kun edukistino viziti la estron de kampa komunumo izolita. Li havas kontaktojn (eble estas simpatianto) kun la kontraŭ-uloj. Temas konvinki lin protekti 2 junulojn de la komunumo, kiuj venos al Rio-Blanko por ricevi

instruadon je sanitara brigadano\*. Sen lia protekto, ili riskas la morton, ĉar la kontraŭ-uloj konsideras ĉiujn, kiuj partoprenas en agoj de la ŝtataj servoj (ĉefe sano kaj edukado) kiel malamikojn. Per diplomatio ŝi sukcesis. Malgraŭ la milito oni vidas naskiĝi rajtan socion, kiu plibonigas la sanon de ĉiuj, inkluzive de la opoziciantoj al la sandinismo.

**Bocana de Paiwais**, nur 15 kilometrojn de Rio Blanco, sed tie temas ne pri influo-batalo, temas pri milito. En la urbeto eniras kaj eliras militistoj. Oni scias, ke kontraŭ-ula bando estas tie, proksime en la montaro. Mi ricevas atestojn de famili-patro kaj nord-amerika pastro pri kontraŭ-ulaj krimoj. La pastro povas veturi nur kun vatikana flago.

**Somoto**, norda urbo je 10 kilometroj de la landlimo de Honduraso. Tie estas pasejo de kontraŭ-ulaj bandoj venantaj el tiu lando, kie estas ilia rifuĝejo. Alarmo, unu la multnombraj. La kontraŭ-uloj ĵus atakis "asentamiento" apud Somoto. La urbanoj, sen paniko, organizas defendajn kaj sanitarajn postenojn. La loka Ruĝa Kruco akceptas la rifuĝantojn el la "asentamiento" (virinoj, infanoj kaj maljunuloj) dum unu semajno. La viroj de la kampara milico forpelis la atakon antaŭ ol alvenas la armeo ; unu kamparano mortis kaj tri estis forigitaj. Verŝajne ili estos kontraŭvole dungitaj en la bandojn de kontraŭ-uloj. Post la alarmo la vivo fariĝas trankvila en Somoto. Malgraŭ la milito, proksima, oni konstruas la pli bonan estontecon. Ekzemple, en tiu ĉi urbo, antaŭe prostitua centro (pro landlima halto de la ŝarĝveturiloj en la tra-amerika vojo) estas, nun, bona akceptejo, kun kvalifitaj laboristoj, por la multnombraj forlasitaj infanoj kaj estas projekto de metiista instrucentro, ĉar en tiu regiono staras bonaj argil-minejoj kaj kulturo de agavo, kies fibro estas utiligata por fabriki hamakojn.

-----  
\* sanitara brigadano : memvola persono, kiu, post instruado, sin ŝarĝas per vakcinado, disdonado de la kuraciloj (laŭ receptoj), disvastigado de la korpa kaj nutraĵa higieno. Ili konas ankau la unuajn helpojn.

\*\* "asentamiento" : hispana vorto, kiu difinas vilaĝojn konstruitajn ekde 1984 por izolitaj kamparanoj, kiuj timas la militon. Tie ili trovas domojn, bienojn kaj ŝtatajn servojn (sano, edukado, agrikultura konsilisto) kaj armilojn por la memprotektado de la vilaĝo.

**Managua**, malsana urbo, kiel ĉiuj latinamerikaj ĉefurboj. Tie vivas triono el la tuta loĝantaro de Nikaragvo. Multaj kamparanoj fuĝis el la militaj zonoj ĝis Managua (antaŭ la kreado de la "asentamiento"). Ĉi tie estas la protekto sed ne estas la laboro. Managua konsumas multe sed malmulte produktas. Malgraŭ la subpremo ekzistas la spekulacia merkato. Ĉiuj alfrontas akvan, provizaĵan, transportan problemojn pro la milito kaj la ekonomia blokado de Usono. Ekzistas en Managua zonoj senprovizigitaj.

Tiu ĉi modesta atesto utilu por helpi vin pri la kono de Nikaragvo. Nikaragvo trapasas seriozajn ekonomiajn malfacilaĵojn pro la agreso (ĉefa kialo) de la nuna usona administracio pere de la kontraŭ-uloj. La agreso ne havas pravigon. Nikaragvo neniu minacas. Ĉu estas konsenteble, ke oni mortigas homojn pro malveraj strategiaj kialoj ? La nikarakvaj aŭtoritatoj, escepte de kelkaj eraroj, montras konstantan volon por batali kontraŭ la malriĉeco kaj persistigi la liberon malgraŭ la situacio de milito.

Nikaragvo bezonas nian helpon. La minimuma helpo estas ĉies aserto, ke devas ĉesi la agreso por ebligi la dialogon inter la nikaragvanoj kaj la konstruadon de la estonteco de tiu lando.

Mi alvokas ĉiujn esperantistojn interesigantajn pri Nikaragvo kontakti min. Ni povus organizi agojn de solidareco kaj, eble, esperantistan kafo-rikoltantan grupon komence de '87 aŭ poste.

**Jean-Louis HUSSE**

---

## LERNEJANA KOOPERATIVO MODELO DE PERFEKTA DEMOKRATIO

Ekde komenco de septembro 1927 ĝis la mezo de 1929 mi frekventis lastajn du lernejarojn de la ŝtata komerca gimnazio "Dimitar Ĥaĝivasilev" en ĉedanuba bulgara urbo Sviŝtov. Tiam ĉe tiu lernejo ekzistis du lernejanaj kooperativoj - nutraĵa kaj lernilara. La nutraĵa kooperativo estis nomata "Solidarnost", fondita je la komenco mem de la XX-a jarcento, kaj havis 3-4 filiojn en la urbo en tiom da ĝiaj kvartaloj. En ĝi aniĝis 700-900 lernantoj. La necesaj monrimedoj estis kolektataj per ĉiumonata monkontribuo de la membroj-lernantoj, kiuj manĝis en kooperativaj ejoj 2-foje ĉiutage - tagmeze kaj vespere. Je la komenco de la lernejarlo la membroj donis al kooperativa kaso pli da mono, kiu necesis por aĉetado de diversaj kuirmaterialoj : fazeolo, lento, terpomoj, cepo k.a., kaj de ŝtonkarbo kaj hejtligno necesaj dum la



vintro. Ĉiumonate la kooperativanoj nomis kelkajn komisionojn por plenumo de ĉiutagaj aferoj : aĉeto de la necesaj krudaĵoj por kuirado sekvontan tagon, por priservi la manĝantojn, por plenumi administrajn kaj kas-kontistajn aferojn. Iuj komisionoj havis unutagan deĵoron, aliaj tutmonatan kaj la kasist-kontisto 3-4-monatan. Ĉiuj membroj de la komisionoj servis senpage, tamen ĉiuj kooperativanoj devis partopreni ilin. Mi mem estis 4 monatojn kasisto-kontisto kaj kiel tia necesis ĉeesti en la manĝo-salono ekde ĝia malfermo ĝis fermo dum la manĝado - tagmeze kaj vespere, por kolekti monon de la kooperativanoj kaj elspezi ĝin per la specialaj unutagaj liverkomisionoj. Nur la laboristoj en kuirejo estis salajrataj specialistoj dungitoj.

Ĉiuj aferoj de la kooperativo estis decidataj kaj gvidataj de la asembleo de ĉiuj kooperativanoj de koncerna filio de "Solidarnost", kiu kunsidis dum aŭ post vespermanĝado. Eĉ la plej malgrandaj aferoj estis pridiskutataj kaj decidataj de la asembleo, neniu rajtis ekster ĝi decidi la aferojn de la kooperativo. Se iu komisiono devis urĝe fari ion antaŭe nedeciditan, la sekvan vesperon ĝi devis meti ĝin en asembleo por esti aprobita. Tie ĉi mi vidis realigita la plej perfekta demokratio, en la homa vivo. Kaj ĝis nun mi ne ĉesis revii kaj labori pri tia perfekta demokratio en kiu ĉiu aparta individuo konstante partoprenas la regadon de la tuta socio kaj samtempe la plenumadon de la plej diversaj ties aferoj.

La alia, la lernilara kooperativo, kies vicprezidanto mi estis unu jaron kaj kiel tia anstataŭis kelkajn monatojn la malsaniĝintan kasiston, prizorgis la liveradon de ĉiuj lernolibroj, kajeroj kaj la plej diversaj formularoj. Pere de tiu lernilara kooperativo ĉiuj lernantoj en la gimnazio komerca, nombrantaj 1000-2000, havigis al si la necesajn lernilojn je malpli alta prezo, kiujn la kooperativo aĉetis pogrande. La kooperativo havis siajn filiojn en ĉiu klasĉambro kaj plenumis siajn aferojn per ties komisionoj : kolektante la necesan monon kaj distribuante la liveritajn lernilojn. En tiu kooperativo ne oficis salajruloj, ĉio estis senpage plenumata de la lernantoj kooperativanoj, nur la faritaj elspezoj estis redonitaj al la komisionanoj elspezantoj, dum ilia laboro estis senpaga.

Jen kiel mi fariĝis kooperativa aganto kaj poste en la vivo mi oficis pli ol 25 jarojn kiel kontisto en kooperativoj vilaĝaj, urbaj, ties asocioj, ĉu produktaj, ĉu konsum-kreditaj.

**G.L. Damjanov**, Kazanlak, Bulgario.

-----  
La sprito de Sacha Guitry :

- \* *Timi ironion, tio estas timi la racion.*
- \* *Malhavi ion ajn - kia torturo ! Malhavi ĉion - kia liberiĝo !*
- \* *Estas homoj, kiuj parolas, parolas, paroladas - ĝis ili fine trovas ion por diri.*

## Memore al Bart De Ligt

Fariĝu kiu vi estas (Pindaro)

La vivo de Bart de Ligt, la granda kontraŭmilitisto kaj socialisto, kiu neatendite mortis en Francio la 3an de septembro 1938 en aĝo 55-jara, kaj kies cindron oni enurnigis en Nederlando semajnon poste, estis dediĉata al la kultura kaj socia renovigo dum pli ol jarcentkvarono.

Komence kiel predikisto de l' ortodoks-protestanta eklezio rezistinte kontraŭ la oficiala kaj degenerinta kristanismo, li baldaŭ partoprenis la batalon por la socialismo kaj fariĝis precipe unu el la plej agemaj propagandistoj por la revolucia kontraŭmilitismo. Li dediĉis la plej grandan parton de sia laborforto al la batalo kontraŭ la milito, morale nedefendebliĝinta, al la propagando por senpera agado, al la organizado de l' militrezistantoj, al la ellaboro de taktiko pri senperfortaj batalmetodoj. Al la principoj kaj la historio de ĉi tiu batalo li dediĉis ampleksan kultur-historian verkon (**La paco kreanta**). Pliklarige : li estis ne "pacisto". Li kontraŭbatalis ne nur la kapitalistan militon, sed super ĉio la kapitalistan pacon. Li rezistis kontraŭ la imperiismo kaj pasie fervoris por la liberigo de ĉiuj subpremataj klasoj kaj rasoj. Kontraŭbatalante la militon, li samtempe atakis la kulton de l' perforto. Agante por rezisto kontraŭ la ŝtatsklaveco, li ĉiam akcentis la "sklavecon libervolan", kaj li bazis sin sur la koncepto, ke fakte ne tiranoj sed nur sklavoj ekzistas. Al li esence pleje gravis la libera disvolviĝo de l' personeco, la humaniĝo de l' socio, kaj la socialismo al li ĉiam estis antaŭ ĉio kulturproblemo.

De Ligt estis granda spirita agitanto, samtempe "ribeliganto" kaj granda edukanto. Lian enciklopedian scion kaj lian akran kaj penetreman intelekton akompanis sprito, malofta en Nederlando, grandaj spontaneo kaj entuziasmo, kaj revolucio kiu inspiris multajn, kaj konsciigis pri tio, kiel oni vivu por "vere esti homo". Li estis nesukuebla pri siaj konvinkoj kaj ideoj, kaj samtempe tre tolerema, sed neniam kompromisema. Ĉiuj, kiuj konis lin, ja sendube povas atesti, ke li estis humana en plej alta grado, kaj amiko unika. Kvankam ankaŭ li kelkfoje estis skeptikulo de l' intelekto, li neniam estis skeptikulo de l' koro. Li povis infane entuziasmi kaj lia forta emo al humoro kaj ironio sendube estis unu el la ĉarmoj de

lia personeco. Per sarkasmo li vipis la demagogojn kaj la sinprostituantojn de l' intelekto.

Al liaj esencaj trajtoj kompreneble apartenis liaj t.n. absolutismo kaj utopiismo, kio tamen ne signifas ke li estis dogmulo aŭ fantaziulo. Tiuj du ecoj certe tute fremdis al li. Legante liajn batalskribojn oni ja ne povas nei la pravon de lia argumento, ke en ili li starigis faktojn kontraŭ frazojn, kaj eblojn kontraŭ ne-eblojn. Sed ĉi tiuj absolutismo kaj utopiismo ja signifas ĉirilate, ke mankis al li la ecoj, kiuj ordinare faras la homon oportunisto kaj reformisto. Oni ne devas vendi aĉi grandajn idealojn por almozo, kaj preferindas malvenki provizore ol plufuŝi en la koto de l' marĉo sen ia principo. De Ligt ripete atentigis pri la gravo de l' utopio kiel mondmovanto kaj senĉese instigante al sendevie pura strebado al idealoj kiujn oni agnoskis ĝustaj, li plenumis eksterordinaran kulturan funkcion.

Li estis Don-Quichot-ulo same malmulte kiel fantaziulo, kvankam li emis rigardi la vivon homa aventuro. Li profunde konsciis, ke ĉio kio ekzistas, indas pereji kaj ke la senco de l' tuta estiĝ- kaj mondproceso tra ĉiujn evoluciojn kaj revoluciojn estas tiu sola granda revolucio : de naturo al spirito.

Observante la kulturprocezon li pensis laŭ miljaroj kaj tamen li samtempe streĉe direktis sin al la praktiko de l' tuja agado. La streĉoj en kiuj li vivis tro intensis temp-altempe, lia laborforto ignoris limojn kaj samproporciis al lia ne-elĉerpebla interesiĝo pri ĉiuj regionoj de l' spirita vivo, kaj ankaŭ sekve de lia fiksideo ke li ne povos plenumi sian taskon, li antaŭenpeligis, lia sano ruiniĝis kaj li forbrulis. Mi ne scias, ĉu li konis la leteron de Nietzsche al Peter Gast, en kiu Nietzsche skribis : "Ve, amiko mia, kelkfoje trakuras mian cerbon la sento, ke fakte mi vivas vivon plej danĝeran, ĉar mi apartenas al la maŝinoj, kiuj povas krevi!" - Sed mi estas konvinkita, ke tiel li pensis, vort' post vorto.

Li estis plene deturninta sin de l' kristansimo, li elkreskis super ĝin kaj se li prefere ne nomis sin ateisto, li faris tiel por eviti miskomprenojn. Ĉirilate li klopodis formuli ĉiam denove, por plejeble ekzakte difini siajn konceptojn. Kun Flaubert li eble povus diri : "Mi estas mistika kaj kredas pri nenio," kaj estas ekster ia dubo, ke oni devos rigardi lin kiel unu el la plej liberaj pensuloj, kiujn Nederlando havis. Sin mem kaj aliulojn li senĉese informis pri sia propra disvolviĝo, kaj sur bazo de liaj grandnombraj verkoj, de "**La evangelia Jezuo**" ĝis "**Erasmus**", oni havas sufiĉe fidindan gvidilon pri lia spirita biografio : kiel li sin disvolvis kaj ŝanĝis, kiel li sin reorientis kaj tamen restis si mem - mallonge : fariĝis kiu li estis.

**Arthur Lehning** (Trad. k iom koncizigis F.Munniksma)

## ESPERANTISMO aŭ HOMARANISMO

--- iama polemiko en japana esperantujo ---

Dum la pli frua duono de 1920-aj jaroj okazis en Japanujo granda polemiko pri Esperantismo. Iuj pretendis, ke la 1-a paragrafo de la Bulonja Deklaracio estas kontraŭ la vera intenco de Zamenhof. Ili postulis amendi la paragrafon. Al ili apartenis unu el la plej grandaj pioniroj, s-ro Ossaka Kenji.

En la maja numero de "La Revuo Orienta" 1923 li komentis pri la Bulonja Deklaracio, dirante : "Iuj asertas, ke la tekston de la Bulonja Deklaracio verkis Beaufront kontraŭ la volo de Zamenhof, kiu subskribis la deklaron en la ĉeesto de Beaufront. Ili donas la paroladon de Zamenhof ĉe la dua Universala Kongreso, kiel la pruvon, ke la Deklaracio spitas lian veran intencon, kaj krom tio mencias, ke la jenaj partoj estis forstrekita el la originala teksto de la Deklaracio :

1) "La dua paragrafo" en la projektita teksto daŭrigis : "Se iam montriĝus, ke per ia alia vojo la ideo de lingvo internacia povas esti realigita pli bone, ol per Esperanto, tiam la aŭtoro de Esperanto aliĝos al tiu nova vojo kaj kune kun li espereble ankaŭ ĉiuj Esperantistoj." Tio ja estas antaŭpreparo de Beaufront, ke li proponos Idon en estonteco.

2) La originala teksto diras : "Neniu havas la rajton fari eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en "Fundamento de Esperanto", kio rakontas la ĉiaman sintenon de Beaufront, kaj tute diferencas la konduton de Zamenhof.

3) Pri ĉiuj duboj pri la uzado de Esperanto decidis monopole kaj diktatore la Centra Komitato (la forstrekita 5-a paragrafo), kio montras la karakterizon de Beaufront.

4) Por atesti fideblecon de eldonitaj libroj Zamenhof donas aprobon. Tio ankaŭ estus tute kontraŭa al la koro de Zamenhof, kaj estas Beaufronteska.

Hodiaŭ ni povas tre facile diri, ke tiu aserto estas erara. Sed se ni metus nin en la tiama situacio en la jaroj ĉirkaŭ 1923 (tiam oni ankoraŭ ne havis eĉ Originalan Verkaron de Zamenhof), tiu ĉi hipotezo povus esti tre verŝajna.

Mi nun tre deziras scii, kiuj estis tiuj "iuj". Bonvolu sciigi al mi, se vi iam vidis tian aserton en malnovaj gazetoj aŭ libroj.

**TUBOTA kôki**

## PRI KELKAJ ABSURDAĴOJ

\* **"la pravecon de sennaciismo montras la fakto, ke la limoj ne ĉiam estas samaj"** : uzanto de tiu argumento montras fakton, kiu devus frapi ĉies okulojn : sennaciismo baziĝas sur la konfuzo inter nacio kaj ŝtato.

\* **"nur hazarde homo naskiĝas en iu nacio"** : nur hazarde mi naskiĝis ino : se alia spermatozoo atingus la ovolon de mia patrino, mi estus viro. Ĉu tiu hazardeco pravigas, ke mi fortranĉu miajn mamojn, kaj provu konvinki miajn fratojn, ke ili fortranĉu siajn kacojn ? Sennaciisto estas eunuko, kiu volas solvi la konfliktojn inter viroj kaj virinoj per ĝenerala kastrado. Cetere, se en novembro 1950 estus bonegaj filmoj en la kinejoj de Saint-Denis, eble miaj gepatroj simple ne koncipus min. Ĉu tio estas pruvo, ke mi ne ekzistas ?

\* **"nacio ne ekzistas por ĉiam, antikvaj nacioj malaperis kaj nunaj nacioj iam ne plu ekzistos"** : ĉu estas reala nur tio, kio estas eterna ? Ankaŭ mi iam aperis sur la tero, mi nun evoluas, kaj post 100 jaroj mi ne plu ekzistos. Ĉu tio donas al iu ajn la rajton min tuj mortigi ?

\* **"ju pli da nacioj, des pli da armeoj, des pli granda danĝero kontraŭ la monda paco"** : denove oni konfuzas ŝtaton kaj nacion ! Do ni ŝanĝu : "ju pli da sendependaj ŝtatoj, des pli da armeoj, des pli granda danĝero kontraŭ la monda paco". Ankaŭ tiel la argumento estas absurda : kio pli minacas la mondan pacon, ĉu, ke grandegaj nacioj aliancas por militaj celoj (kiel NATO aŭ la Varsovia Pakto), aŭ ĉu la fakto, ke Liĥtenŝtejno havas sendependan ĝendarmaron ?

\* **"religio ne estas racia"** : laŭ PIV racionalismo estas doktrino, kontraŭa al mistiko kaj pragmatismo, kiu akceptas nur la sciojn bazitajn sur la racio, malakceptante la senton kaj la kredon kiel ilojn de konado kaj fontojn de vero. Laŭ mi, racio estas unu el la fontoj de vero, kiun kutime ankaŭ dikredantoj posedas kaj uzas. La problemo estas : kial fortranĉi de si mem la aliajn kapablojn de la homa menso ? Rezigni pri mistiko, ĉar ĝi estas alia afero, ol estas racio, estas tiom prave, kiom detruji siajn okulojn pro tio, ke per ili ne eblas ion ajn aŭdi.

\* **"mi neniam povis kompreni la Biblion, ĉar ĝi ne estas racia"** : jen bela konfeso pri sia malkapablo liberigi sin mem el la influo de la racionalista medio ! Ĉu ne strange, ke homoj,

kiuj skribas tion, estas membroj de iu asocio, kies celoj estas kutimigi siajn membrojn al eksternacia pensmaniero kaj liberigi ilin el la influo de iliaj diversaj medioj ? Ĉu la homoj, kiuj ne kapablas kompreni la Biblion, ĉar ĝi ne estas racia, neniam legas romanojn, pro tio, ke ili rakontas nur fikciajn aferojn ? Ĉu ili neniam iras al kinejoj por vidi ion alian, ol dokumentajn filmojn ? Ĉu ili neniam legas poemojn, ĉu en Esperanto, ĉu en aliaj lingvoj ? Se ne, do ili estas simple senkulturaj homoj, kaj mi kompatas al ili.

\* **"vi estas kristana nur pro influo de via medio"** : neniu el la homoj, kiuj iam metis al mi tiun argumenton, efektive konas mian medion, ekzemple familian. Tial tiu aserto estas nura dogmo. Krome, ĝi estas absurda : ne ekzistas homo, kiu ne estas influata de aliaj homoj. Robinson Crusoe sur sia insulo estis sub la influo de sia angla edukado, kaj Victor el Aveyron ne havis grandan penskapablon. Kio gravas ne estas, el kiu medio oni devenas, sed, ĉu oni kapablas sufiĉe liberigi sin mem por pensi memstare. Strange, ke la samaj homoj, kiuj metas al mi tiun argumenton, samtempe insistas, por ke mi legu precize la librojn, kiuj ilin mem influis. Unu el ili eĉ asertis al mi, ke li estas denaska ateisto.

\* **"sennaciismo konsistas nur el la lukto kontraŭ naciismo kaj ties damaĝoj"** : Lanti tre bone sciis, ke tiu aserto estas erara, sed rifuzis klerigi tiujn, kiuj iluzie kredas ĝin prava. Kiel Lanti sciis, la praktikado de Esperanto, en iu ajn el la diversaj esperanto-movadoj, aŭ ekstermovade, estas per si mem lukto kontraŭ naciismo. Sennaciismo celas pli. Sennaciismo estas, laŭ PIV, kultura doktrino, fondita de Lanti, kies ĉefaj celoj estas la malapero de ĉiuj nacioj rigardataj kiel suverenaj unuoj, la racia utiligado de ĉia materialo kaj energio profite al ĉiuj homoj, unuecigo de ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj, kaj uzado de Esperanto kiel sola kulturlingvo (substrekas mi). Ne estas troa la aserto, ke sennaciismo celas la morton de ĉiuj homaj kulturoj minus unu : tion Lanti tre klare skribis. Kiel homoj povas aliĝi al tiel barbara ismo ? Nur pro la efiko de propagando : same kiel la racionalisma propagando volas kredigi, ke ĉiu homo, kiu rifuzas racionalismon, estas nekapabla pensi racie, same la sennaciisma propagando celas kredigi, ke ĉiu homo, kiu rifuzas sennacismon, estas mistikulo, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio.

Jakelino.

Ĉi-lasto alineo devus troviĝi en la komenco! Pri tio kulpas la ventkapa red.

# KOSMIOLOGIO

(daŭrigo)

Kompreneble, dupaĝa artikolo ne sufiĉas por komplete informi pri nova ideo. Krome mi opinias, ke plurfoje verki mallongan artikolon estas pli efike ol prezenti multipaĝan verkaĵon. De la unua mi finis per la diro, ke inter esperantistoj ni ne uzu la vorton ILI. Kiel eŭropano mi deziras forgesi la eŭropan tragedian tradicion. Anstataŭe mi volas pristudi la hodiaŭon per kosmia sento. Ne plu traduki pensojn el pasintaj periodoj, sed per futurenpensado mi volas konsciiĝi pri la valoroj el diversaj kulturoj por ekkoni la sintezan bazon, sur kio povas disvolviĝi nova kulturo. Tamen mi restu realisma. La legantaro de **Laŭte** estas nur tre malgranda rondo, kaj pro tio mi povas dubi pri ĝia influo, sed per kosmia sento ĝi povas penetri en pli vastan medion. Per hodiaŭaj komunikiloj nova vero povas fulmrapide atingi eksponencialan disvastiĝon. Plej grave estas, ke ni uzu simplajn lingvaĵojn aŭ tuj faru klarigon.

Eksponeciala kresko estas kiel laŭ la ritmo 2-4-8-16-32-64- ktp ; do 18.446.744.073.709.551.616 estas la rezulto de la sesdekkvara potenco de DU ( $2^{64}$ ). Kiel 76jara junulo mi antaŭ nelonge sukcesis encerbigi ĉi nombron. Mi lernis ĝin parkere kaj ankoraŭ ne forgesis. Por trovi la solvon mi uzis nur kraĵonon kaj grandan folion da papero plus volon kaj paciencon. Mi konsentas pri la opinio, ke volo kaj pacienco dependas de la kontakto kun kosmio.

Ne estas eksterordinara fenomeno, ke mi sukcesis, ĉar ĉiu individuo povas transpasi la regionon de sia sciado. Jen la transcenda karaktero de kosmio. Due ĝi reciprokas. Kiam ni volos, tiam ni trovos la vojon al - kaj la paciencon el kosmia potenco. Kiel knabo mi lernis kalkuli. Adicii (+) subtrahi (-) multipliki (x) kaj dividi (:). Poste en la metilernejo (origine mi estis meblisto ; same kiel LANTI) oni instruis al mi trovi kvadratradianon.  $\sqrt{16} = 4$  ;  $\sqrt{16} = 4$  ;  $\sqrt{4} = 2$ .

$$|x| = \frac{1}{156}$$

DU ne havas radikon. DU estas kiel  
 $26 \times 6 = \frac{156}{0}$  birdo en aero, do NE kiel planto en la tero. Jen simpla vero pri kio kosmiologoj ne diskutas inter si,

sekve ili ne perdas daŭron kaj energion tiel ke harmonio restu inter ili. Harmonio estas urĝe necesa ekvilibro inter diroj kaj komprenoj. Laŭtaj krioj ne utilis, se komprenemo mankus. Tial atentemo estas individua potenco, kiu preventas miskomprenon. Tiu, kiu volas kompreni, havas kontakton kun la plurdimensia potenco de kosmio. "Plurdimensia" signifas, ke krom

la kvar konataj dimensioj ekzistas pluraj ebloj por mezuri la grandegan valoron de KOSMIO. Kosmio estas nenies kaj ĉies. Ja ĉiu individuo, KIU VOLAS, povas prunti el tiu fonto. Oni ne supozu, ke tio temas pri religio ; kaj ĉiu el ni povas science sperti, ke tia fonto ekzistas en ĉio vivanta. Ni ne bezonas propagandi kosmion. Pli kaj pli da individuoj sur nia planedo en diversaj medioj, riĉaj kaj malriĉuloj, simplaj kaj tre kleraj, jam spertis la ekziston de kosmio. Ni malfermu niajn psikologiajn okulojn ! Esperplena fenomeno.

iea iu.

## Komentoj pri "Laŭte!" n-ro 65 :

p.15. Kara HoMo, jen miaj komentoj aŭ rimarkoj pri

### **(LA) NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO (N.P.)**

(fare) de D-ro Rubeno FELDMANO GONZALIDO (= RFG)

Laŭ ĉi tiu neordinara animskua libro oni nepre konstatas, ke RFG estas plej admirinda geniulo kaj eksterseria E-isto! Kaj ĉi tiu verko lia estas eĉ pli eksterordinara por mi, kiu jam de la jaro 1978a konatiĝis kun la psikotransformismo, ĉar ja la vorto METANOJO (trans la menso, nome trans la ordinara menso - penso kaj kono aŭ scio) uzata en la N.P. signifas ekzakte : "psikotransformiĝo" ! Kaj pri ĉi tiu afero ĝi temas...! sed ĝi nek donas nek povas doni la metodon kiun oni disvolvas en la sekvantaj 4 bazaj verkoj :

- 1) **Psikotransformismo** - por nova maniero de pensado - (En Eo, havebla ĉe la UEA-libroservo)
  - 2) **Psychologie de la possible évolution de l'homme**, de P. D. Ouspensky
  - 3) **Fragments d'un enseignement inconnu**, de P.D.Ouspensky
  - 4) **Commentaires psychologiques aux ouvrages de Gurdjieff et Ouspensky** de Dro Maurice Nicoll (Volumoj 1 kaj 2) (La lasta 3 estas gurdajaŭ!)
- Alia bibliografio leginda kaj legenda, studinda kaj studenda:
- 1) **Kiel interpreti la Bibliion laŭ la psikologia metodo** (en Sennacieca Revuo n-ro 110, jaro 1982a). Bedaŭrinde kun kelkaj eraroj, kiuj ĝenas la kompreneblecon (...)
  - 2) **Tertium organum** (Tria organo) de P.D. Ouspensky
  - 3) **Un nouveau modèle de l'Univers**, de P.D. Ouspensky
  - 4) **Rencontres avec des hommes remarquables**, de G.Gurdjieff
  - 5) **Making a new world**, de J.G.Bennet (eldonita en Londono en 1973a ; ĝi amplekse disvolvas la leĝon de reciproka subtenado de ĉio ekzistanta)

6) **Views from the real world** (Perspektivoj el la reala mondo, aŭ Ekvidoj en la reala mondo) de G.I.Gurdjieff.

Bedaŭrinde RFG mencias (sur p.126a-10dm) nur la verkon de Maŭrico NIKOLO (Nicoll) : **The Mark** (kastilie aŭ amerik-hispane : **La flecha en el blanco** / La sago sur la celtabulo), kaj kelkajn verkojn de Kriŝnamurto, sed li ellasis - mi ne komprenas kial - la bibliografion kiun mi citas ĉi-supre.

(...) Krome, en la Ea eldono de N.P. mankas la traduko al Eo de la lasta kovrilpaĝo de la argentina (kastililingva) eldono, kies tradukon ĉi-sekve mi provizas :

"" La psikologia paradigmo kiun prezentas ĉi tiu verko konsistigas novan ordon de abstraktado en psikologio kaj proksimiĝo al la integriĝo de ĉi tiu disciplino kun la neŭrofiziologio kaj la fiziko nuntempa.


Ĝi implicas reorganizon de malnovaj konceptoj ; ĝi senfortigas la emfazon de la subkonscio, kiun ĝi situigas en mensa procezo unueca, kiun la aŭtoro nomas Procezo META (el la grekaj vortoj: Mnemonika-Ejdetika-Timika-Aŭtonomika)(Nome: Enmemora gravurado intelekta, emocia, instinkta-motora) kaj kiun mi preferas nomi Esperante : Procezo MEMA, nome : Procezo MEMA, nome : Procezo Mense Estiganta Memoron Aŭtomatan ; kompreneble ĝi temas pri la spertado-lernado dum infanaĝo kaj juneco.

Ĉi tiu Procezo MEMA konsistigas la esencon de la identeco (la mio aŭ egoo) kaj oni povas simpligite egaligi ĝin al la pensado (aŭ scio ordinara).

En la N.P. la emfazo troviĝas sur tio nomata "UNUECA (aŭ pli bone : UNUIGA!) PERCEPTADO", kiu estas la integriĝo konscia kaj nekonscia de la aktivado de l'kvin sensoj, precipe tiuj de vidado kaj aŭdado. La koncepto de unueca perceptado ekas de baza eltrovo : La homo vivas ĝenerale en malsamaj gradoj de konekto, malkonekto kaj miskonekto kun la realo. Jen kial necesas relerni percepti, kaj sekve, pensi kaj eksperimenti. Kaj tiu relernado konsistigas la bazon de nova psikologio, nome, de la METANOJO aŭ psikotransformiĝo!

Alia koncepto grava kaj noviga estas tiu pri kariono aŭ nukleo, kiun "topografie" eblas priskribi kiel mensan spacon sen la centro de la "mio", kaj kiu "dinamike" koncernas al la stato de metanojo, nome, al tio kio estas "trans la penso aŭ scio" ordinare akirita.

(...) **KONKLUDE** : Plej studinda verko, sed la ampleksan-kompleksan disvolvon de la metodo oni trovos en la koncerna bibliografio. ""



urĝa alvoko !

! alvoko urĝa

## NI FULMCERBUMU !

Kaŭze de la laŭdinda instigo de la maljunulo VALO jen urĝa alvoko al ĉiu junspirita esp-isto. Fulmcerbumado signifas : ŝtormataki problemon, kiu ŝajnas nesolvebla. Junspiritaĵoj grupiĝu en malgrandaj rondoj por organizi FULM-CERBUMADON.

Bazaj reguloj por fulmcerbumado estas :

- 1 KRITIKO ESTAS EKSKLUDATA, nefavoraj prijuĝoj al ideoj estu prokrastataj ĝis resumado.
- 2 NE BREMSU VIAN PENSADON ! Ju pli sovaĝaj la pensaĵoj, des pli efikaj. Pli facile estas subpremi ideojn, ol ke ili estas esprimitaj.
- 3 Ju pli da ideoj, des pli bone. El pligranda kvanto da ideoj rezultas pligranda ŝanco por trovi ĝustajn.
- 4 KOMBINADO kaj PLIBONIGADO estas ŝatataj ! Proponoj sekve de alies ideoj estigas plibonajn ideojn. Kombinado de ideoj ne nur pligrandigas la kvanton da ideoj, sed ankaŭ plibonigas ilin.

La alvoko estas urĝa, por ke antaŭ la fino de ĉi tiu jaro en kiom eble plej da lokoj sur nia planedo en sama periodo okazu FULM-CERBUMADO. Estas dezirinde, ke ĉiu ano de fulmcerbuma rondo kontaktiĝu aparte kun alia rondo, tiel ke estiĝu tutmonda reto de junspiritaĵoj fulmcerbumantoj. La problemo estas : Kiel efektiviĝi eksponencialan kreskon de la nombro de uzantoj de la lingvo Esperanto ?

Ke oni konigu ĝin dise !

! alvoko urĝa

urĝa alvoko !  
(iea iu)

K-do B.G.D. informas la malnovajn SAT-konatojn, legantojn de L!, ke li ĵus ekŝiĝis de SAT post kvardek jaroj da SAT-aneco. La ĉi-sekva artikolo ne aperigita en S-ulo en kadro de la pseŭdodebato pri "SAT kaj la religio", pli informos ilin pri la kaŭzo kaj la procezo de la afero. Plu komenti ne necesas.

## PRECIZIGOJ PRI "ALTERNATIVO"

La artikolo de K-do Lagrange "Debato pri religio" nepre trudas min precizigi kelkajn punktojn.

1<sup>o</sup>- Ĉar jam estis decidite aperigi en S-ulo la diskuttemon "SAT kaj religio", la demandoj pri la "kialeco" kaj la "tialeco" de tiu diskuttemo estas superflua kaj povas nur falsi la debaton kaj forgesigi la veran temon.

2<sup>o</sup>- Tiu diskuttemo ĉiam aktualiĝis, aktualiĝas kaj aktualiĝos pro la anti-dogmismo mem de SAT fronte al la arbitra dogmismo de la religio provanta trudi, kiel nekontestebajn realaĵojn, antropomorfismajn konceptojn rekte fontintajn el la homa imagkapableco. Ĉu oni trudas la fablojn de Lafonteno ? Kial do trudi la Bibliajn ? Tiu trudo mem, kiu provas konkretiĝi en la sociaj rilatoj kaj regi ilin, estas la kaŭzo de la antagonismo inter SAT kaj la religio. La sociaj rilatoj kaj la religio estas du apartaj aferoj : la unua rilatas al la civitano, la dua al la apartulo. Ambaŭ konsistigas la individuecon de ĉiu sociano. Nepre necesas ne konfuzi ilin... kaj la ŝafoj estos pace paŝtitaj.

3<sup>o</sup>- Mi verkis kaj sendis mian artikolon "Alternativo" komence de majo 1985, do sep monatojn antaŭ la aperigo de la diskuttemo pri "SAT kaj la religio" en S-ulo, kaj ok monatojn antaŭ ĝia aperigo en kadro de tiu diskuttemo, al kiu ĝi ne estis destinita. Efektive mi verkis tiun artikolon kiel sekvon al pluraj aliaj samtemaj, kiujn neniu rebatis. En ĝi mi nur demandis al la kristanoj bonvoli respondi al mi, kiel ili sukcesis akordigi la dogmismon de sia religio kun la antidogmismo de SAT. Nur al tiu demando mi ĉiam deziras, ke la kristanoj respondu. La konstato, ke mi ĝenerale samkonceptas kiel Lanti jam de longe ne plu surprizas min.

Mi devas aldoni, ke la "P.S." de "Alternativo" estis verkita ses monatojn post ĝi, ĉar, pro la nekomprenebla neaperigo de mia artikolo en S-ulo, mi petis ties redaktoron ĉu li intencas aperigi ĝin. Li respondis, ke li intencas aperigi ĝin en la Decembra N<sup>o</sup> de S-ulo en kadro de diskuttemo pri "SAT kaj religio" (fakte ĝi aperis en la Januara N<sup>o</sup>) kaj demandis min ĉu mi deziras, ke ĝi aperu en sia unua formo. Mi respondis, ke jes, sed kun la aldono de tiu "P.S.", kiun mi tuj verkis por klarigi pri la vera celo de tiu artikolo, kiu do ne estas respondo al la artikolo de Lanti prezentita kiel enkonduko al la diskuttemo pri "SAT kaj la religio". Kial oni ne aperigis mian artikolon en sia tempo, pri tio la redaktoro eble bonvolos mem respondi, se ne respondeci.

4<sup>o</sup>- Mi ne estas liberpensulo, sed liberpensanto t.e. : memobservanto, memkomparanto, memeksperimentanto kaj memkonkludanto por mi mem, kaj por la aliaj se tio eblas. Mi prezentas miajn proprajn konkludojn, bonvolas diskuti pri ilia pravenco, sed pri ĝi tute ne intencas konvinki kiun ajn. Ĉiu mem decidu por si mem.

5<sup>o</sup>- De la komenco de Esperanto la konceptoj pri sennaciismo kaj sendogmismo estas nete implicataj en la konceptoj pri unulingvismo. Lanti nur post-

paŝis la Vojon signitan de Zamenhof. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas rememori la du unuajn strofojn de la "Preĝo sub la verda standardo", kiujn ĉiu esperantisto relegos kun profito, kaj el kiuj mi ĉerpas tiujn versojn :

"Al vi, ho potenca senkorpa mistero  
Fortego, la Mondon reganta,

.....  
Al vi ni ne venas kun kredo nacia, (sennaciismo)  
Kun dogmoj de blinda fervoro ; (sendogmismo)  
Silentas nun ĉiu disput' religia, (toleremo)  
Kaj regas nur kredo de koro. (bonvolemo)

En ili rebriliĝas la tuta SAT-statuto kun sia implicata celado al vere homa sociordo.

En "Kriaĉulo respondas", kiu normale devus esti aperinta en la lasta S-ulo, mi klarigas pri kio estas, laŭ mi, tiu "senkorpa mistero la mondon reganta" de Zamenhof. Ĝi estas la de la modernaj fizikistoj tiel nomata "nemortema magneta materia memoro", kiu fine de la universala radiado, fariĝas "remanenco" en la plej etaj atomparkoj. Laŭ mi tie estas la punkto, kie mistikismo kaj racionalismo harmonie konfuziĝas kaj ĉion klarigas.

Se iu havas pli taŭgan koncepton por proponi, tiu bonvolu prezenti ĝin en S-ulo. Aprobi aŭ malaprobi estas ja nepra devo de ĉiu SAT-ano. Silentado rekte malas al la SAT-statuto kaj al la pluekzistado de SAT mem.

Mi antaŭdankas al la rebatontoj.

En Eymet la 27an de Februaro 1986  
B.G.D. (21758) Eymet.

## ANKORAŬFOJE $\sqrt{2}$

Kiam oni kalkulas, konvenas kalkuli ĝuste. Tion faris PMG, kaj li trovis  $\sqrt{2} = 1,414213...$

BGD opinias tiun ĉi nombron "empiria". (Kial?) Kaj li provis refari la kalkulon, kaj li trovis :

1,414228


Kial tiu diferenco ? Tial ke bedaŭrinde en lia kalkulo estas eraro.

Ni reprenu L! 68 p.30. En la kvara linio de la operacio ni legas 64400. Devas esti 60400. De tiu eraro sekvas malĝusto de la postaj decimaloj.\*

----  
\* Ni kontrolu la du nombrojn per inversa kalkulo :  $1,414228^2 = 2,0000423...$   
 $1,414213^2 = 1,9999984$ . La unua proksimas al 2 je + 423 dekmilionoj, la dua, je - 16 dekmilionoj, ĝi estas do pli ol 25-oble pli proksima. Kaj oni facile konstatas, ke ĉiufoje kiam oni aldonas unu plian decimalon rezultantan de ĝusta kalkulo, la proksimeco ankoraŭ pliboniĝas.

La malsingarda artisto-trapezisto falis en sian falsirmreton.

BGD pretendas vidi konfuzon inter du nocioj : la areo de kvadrato = 2 kaj ties diagonalo, kies longo "ankaŭ ŝajne" (sic) estas 2. Nu, ni konsideru tian kvadraton. Ĝi estas dividebla je du ortangulaj izocelaj trianguloj kun egalaj lateroj  $a$  kaj hipote-nuzo  $d = 2$ . En tiaj trianguloj  $a = \sqrt{2}$ , ĉar  $a^2 + a^2 = d^2$ . La areo de ĉiu el tiuj trianguloj estas :



$$1/2 (a \times a) = 1/2 (\sqrt{2} \times \sqrt{2}) = 2/2 = 1 \text{ aŭ}$$
$$1/2 d \times d/2 = d^2/4 = 4/4 = 1$$

kaj la areo de la kvadrato estas  $1 + 1 = 2$ . Kie estas konfuzo, krom en la cerbo de nia artisto ?

Valo

### Letero el Argentino

"... 411 estas la kvanto de strikoj faritaj de niaj sindikat-estroj dum unu jaro de junio 1985 ĝis majo 1986 (eĉ pli, laŭ kelkaj ĵurnaloj kaj gazetoj). Fine de julio, la kvanto estis 475. Mi demandas min, ĉu oni povas plibonigi nian katastrofan ekonomian situacion tiel ? Mi bone scias, ke la ekonomia situacio de nia lando estas malbonega. Sed mi opinias, ke oni povas trovi solvojn por plibonigi vivkondiĉojn de nia laboristaro, tamen devas agi la laboristaro mem, ĉu kreante kooperativojn aŭ provizejojn, aĉetante ilarojn kaj manĝaĵojn rekte el ilia deveno kaj distribui ilin rekte sen peranto al la laboristaro. Ankaŭ en ĉiuj vilaĝoj kaj urbetoj estas parceloj, terspacoj, kiujn oni povas kultivi, kaj kiujn mastroj bonvole pruntos, sed nenion faras : tie oni povus semi ĉiujn specojn de legomoj, terpomojn... Ankaŭ konstrui domon. Estas vere, ke tio estas tre multekosta, sed ĝin oni povas konstrui per reciproka helpado. Tamen oni nenion faras. Estas pli facile krei kontraŭ ĉiujn registarojn ol labori kaj krei. La fisindikatestroj estas tre, tre riĉaj. Ĉu ankaŭ en Eŭropo estas tiel ?..."

O.S.T.

### ĈAPELOJ DE ESPERANTO

La disvastiĝo de Esperanto estas evidente katenata de ĝiaj superfluaĵoj, kiuj igas ĝin malfacile praktikebla en kampoj tempoŝparaj kaj kromlabor-evitaj, ekz. komerco, industrio, kaj ne bonvenata de la English-mondo, kiu entenas ne nur tiujn anglalingvajn landojn, ankaŭ plejparton de terenoj studentaj kaj superstudentaj de la ceteraj landoj, pro tre simpla motivo : netajpebla sur iliaj tajpiloj kaj komputoroj.

En iu informo de 1985 el Usono pri provo de nova aranĝo de la angla alfabeto sur tajpilo, laŭ mia memoro, la English-tajpiloj en la mondo nombris 60 milionojn. Do el ili, kiu bonvolas pagi por adapti sian tajpilon por E-bezono dum English tajpigas tiel flue ?

En alia informo de 1985, iu ĉino demandis alian ĉinon oficistiĝintan en UNO : kial UNO ne uzas Esperanton ? Tial, ke la alfabeto ne tajpeblas de UNO-aj tajpiloj kaj vidiĝas malbele kaj konfuze, precipe en minipresaĵoj, ekz. ĵ, respondis tiu.

Por solvi tiun problemon, do kio fareblas ?

La ĉina lingvo vizaĝas al la sama temo, sed ties malfacileco ne kompareblas kun tiu de E. Ĝiaj ideografiaĵoj estas tre malfacilegaj por lerni, memori, skribi kaj precipe por tajpi. En la lasta jarcento, multaj eminentuloj pledis ĝian skribmanieran reformon - alfabetigon, sed vane, almenaŭ ĝis nun neefike. Ju pli rangaj la ĉinlingvaj laborantoj estas, des pli oponemaj al tio, tamen ilia pedanteco ne povas bari tendencon simpligi skribformojn far modestaj popolanoj - vendistoj, aĉetistoj, staplistoj, sekretarioj, stencil-skribistoj, notfarantoj, kiuj skribas iam kaj iam kontraŭ la normo siajn banalaĵojn per simpligitaj formoj, nur se ne-konfuzaj kaj facile rekoneblaj. Jardekon post jardeko tiuj formoj populariĝas, poste aperas vorto post vorto en sinsekve kompilitaj vortaroj, kaj fine, de la registaro ili oficialiĝis en 1956.

Tia fenomeno ne haltigeblas, akorde kun kio, feliĉe la ĉina registaro tenas progreseman konduton, same kiel sian subtenon al Esperanto, farinte provan projekton de la duafoje simpligitaj skribformoj en 1977. Tamen la konservativo estas tiel obstina, ke la unua projekto post 30-jara sukcesa praktiko en la ĉina kontinento ĝis nun ankoraŭ ne akceptiĝas de Tajvan kaj Hongkong, kie oni jam sin adaptas al la moderna tekniko en plipartaj terenoj, kaj ke la dua provprojekto haltis en la kontinento en la sama jaro de sia publikigo. Fakte, en tiu proceso la lingvo ŝanĝiĝas neniom : la sama prononco prezentas la saman objekton, la sama gramatiko koherigas la samajn frazojn. Ŝanĝo estas nur tia, ke oni memoras kaj skribas tiujn vortojn kun malpli da peno.

Lingvoj estas stabilaj, ili evoluas lante de epoko al epoko, malfacile rimarkeble de nur unu generacio. Ankaŭ Esperanto estas tia. Ne eblas ekesta reformo sur ili, sed eblas tia, kia estas skribforma simpligo en la ĉina lingvo.

Aperu unue en iu sfero de iu rondo novaj formoj facile interkompreneblaj pro sia oportuno. Se sekvos ne konfuzo sed

bonefiko, ili koniĝos de unu al aliu, de rondo al rondo, post jardeko(j), ĝis populariĝo kaj oficialiĝo.

Pardonon do. Kiam estas korinklino al Esperanto sed kun manko de ĉapeloj en la tajpiloj kaj komputoro, ne forlasu ĝin sed uzu tian ĉi paralelon, kiun oni rekonas facile kaj kutimas rapide kaj kiu efektive absolute ne meritas la timigan titolon "reformo" :

w ---- ŭ	(sen disputo)	
q ---- ĉ	(bonakceptata de ĉinoj)	} pro proksimeco al al la ĉina alfabeto)
x ---- ŝ	(bonakceptata de ĉinoj)	
y ---- ĵ	(bonakceptata de ĉinoj)	
kh --- ĥ	(aperanta tre malofte)	
dy --- ĝ	(dum y pron.: [j], dy pron.: [dʒ])	

Jen ekzemplo :

"Lingvo ne xandyebblas kiam dyi profundidyas jam en cerboj de miloj da homoj, tamen xandyebblas kaj fakte iam jam xandyidyis dyia portilo - skribformo. En Ewropo : de la greka alfabeto al la latina kaj slava. En Qinio : de piktogramoj al piktofonetikoj skribidyantaj de malflue al flue kaj de malfacile al facile. En Japanio : de la nura qina skribformo al la paralelo de kvar formoj. Ekz. :

qina skribformo hiragana katakana latinalfabeta

日立      ヒトチ      ヒタチ      Hitachi

Eĉ se qiu lingvoj skribidyus per la latina alfabeto, qinlingvo restos la qinlingvo, japanlingvo restos la japanlingvo, neniel alio. Analoge, kiam Esperanto skribidyus sen ĉapeloj, dyi restos nenio alia ol la lingvo de Zamenhof, absolute neniom rilate la Idon de Couturat. Ni ne devus nervozidyi je ektuxo al la senĉapeligo - qifoje paraleligo."

Shao Shukang

-----  
La sprito de Sacha Guitry :

\* *Mi kredas, ke la virinoj estas faritaj por esti edzinoj kaj la viroj por esti fraŭloj. De tio fontas la malbono !*

\* *La nura amo fidela estas la memamo.*

\* *La muro ekzistanta inter viro kaj virino, kiuj ne konas unu la alian, estas pli facile transpasebla ol la abismo, kiu kaviĝas inter tiuj, kiuj sin tro konas reciproke.*

## Diskutado de la okcidenteŭropanoj

Kun intereso mi legis en "Laŭte!" n-ro 68 diskutadon pri amaskomunikiloj. Legante, kun unuj mi konsentis, aliajn malaprobis. Sed kial tiu titolo "Diskutado de okcidenteŭropanoj?" Ĉar, efektive, simila diskutado eblas nur Okcidente.

Unue, ĉar oni havas eblecon eldoni "Laŭte!" sen miksiĝo de la franca sekreta polico kaj konstanta ŝtatoficista cenzurado (ne imageblas simila revueto en Sovetio... malkontento pri registaro, paroloj pri manipulado, malfido al ĵurnalistoj... tuj oni akuzus lokajn Garolojn kaj Jakelinojn pri "kontraŭsovetia propagando kaj agitado" kaj sendus ilin reedukiĝi dum procezo de "socialisma laboro" en lokojn malproksimajn). Due, ĉar plendi pri inundo da informoj oni povas nur Okcidente. Ha, jes, se kalkuli la ĝeneralan eldonkvanton kaj titolon, verŝajne Sovetio denove okupus la unuan lokon (kaj facilcredemuloj Okcidente flegos miton pri "la plej kultura lando de la mondo - Sovetio"). Al tiuj mitoŝatantoj mi konsilus aĉeti dekojn da sovetiaj gazetoj kaj provi trovi diferencon en analizo de tutmonda situacio... Ĉie vi trovos samajn komunikojn, samajn informojn, samajn konkludojn. Varias nur regionaj novaĵoj (en tiu kolfozo la avangarda melkiŝtino nomiĝas tiel, en alia - aliel, ktp.). Jes - diros vi - ankaŭ en Francio oni preparolas la samon, se iu evento estas grava. Preparolas - sed diversamniere ! La rezultoj de analizo estas diversaj. Kaj por homo tiucele estas donita cerbo, por ke li komparu, analizu, serĉu, pensu mem. En Okcidento oni havas ankaŭ tiun avantaĝon ke en multajn lokojn de la tergloba oni havas eblecon vojaĝi kaj kontroli mem (problemo : ne pri mono, ne pri lojaleco al ŝtata reĝimo ; ne franca sekreta polico decidas ĉu la franca civitano N. rajtas viziti tiun aŭ aliu landon, ĉu tiu civitano N. estas "politike matura", "morale forta"\* por lasi lin eksterlanden).

Do, oni plendas pri abundeco da reklamoj. Kion mi diru ? Ĉe ni reklamoj tute forestas. Ĉar ne estas kion reklami. Se estas kelkaj varoj reklamindaj, tial plejparto foriras por eksporto, alia parto kuŝiĝos sur bretojn de specialigitaj vendejoj por eksterlandanoj kiel "Berjozka" (jen ankoraŭ unu specimeno

-----  
\* kliŝo el karakteristiko (papero el laborejo, priskribanta la labor-, moral-, politikajn trajtojn de individuo) bezonata al ĉiu sovetiano deziranta vojaĝi eksterlanden. Nepras ankaŭ por viziti t.n. "frat-ajn landojn".



de apartismo : eksterlandano/sovetiano!), restaĵoj distribuigis inter nomenklaturistoj. Por tutpopola uzado restas : reklamado pri "Frata amikeco de popoloj", "patrina zorgo de Partio", "brila estonto - komunismo" ktp. ktp. Oni estas sategaj pri ili ! Ha, kiom oni dezirus vidi - almenaŭ per televido - tiujn malŝatatajn spagetojn de Barlusconi ! Plus - diversajn manĝaĵojn, vestaĵojn, purigilojn ktp. - por havi almenaŭ imagon kio ĝi estas. Sed mi jam aŭdas akuzojn pri "burga konsumismo", tial : silenton. Tutkompreneble, ĉiu troigo estas malbona, tamen pli bonas tiaspeca troigo ol konstanta manko de la aĵoj plej necesaj.

Krome, el kie fontas tia ĝenerala malfido al ĵurnalistoj ? Kiel en ĉiu profesio, ankaŭ inter ĵurnalistoj troviĝas homoj honestaj kaj malhonestaj. Mi havas profundan konvinkon ke plej granda parto de tutmonda ĵurnalisto konsistas el homoj honestaj (eĉ en Sovetio, kie ĉio estas la ŝtata posedaĵo, kaj sendependaj publikigaĵoj ne eblas - mi ne parolas pri "samizdat-kaŝeldonoj). Kompreneble, nur honesteco en ĵurnalista metio ne sufiĉas. Bezonatas alta kultura nivelo, analizkapableco, sciavido, multfoje : civila kuraĝo. Misinformado havas diversajn kialojn. Ĝi povas fondi ankaŭ el nesufiĉa klero, malkompetento pri diskutata demando, intelekta pigreco. Ekzemple en Okcidento granda amaso da ĵurnalistoj havas tre nebulan imagon pri nacia konsisto de USSR. Ĉiu "Laŭte!"-leganto estas ĉiutage misinformata... ne pro malbonintencoj de lokaj ĵurnalistoj, sed pro ilia malkompetenteco. Kaj vi aŭdos ekzemple, ĉe la franca televido aserton : "Sovetio ekzistas jam 4000 jarojn, sed Izraelio nur ekde 1948-a" (Sovet-Unio estis kreita en la 1922-a jaro, do - vidu la diferencon! ĉu ne anekdoto?), sportraportistoj rakontos al vi pri "rusa sportisto" Serhij Bubka (malgraŭ tio ke Serhij Bubka klare deklaris ke li estas ukraino), aliaj informos vin pri "rusaj artistoj" el Riga (ĉefurbo de Latvio, ankoraŭ antaŭ la Dua mondmilito sendependa ŝtato) kaj tiel, ĉiutage. Kio estas plej interesa en ĉi tiu misinformado, Sovetio neniam protestas, neniam parolas pri "kalumniado" kiam anstataŭ vorto "Sovet-Unio" oni uzas : "Rusio". Kontraŭe, ĝi favoras al simila miksaĵo (kaj la glorigata "frateco de la egalrajtaj popoloj"?!).

La bildo pentrita de J.C. Picquet estas ravaĵo. Sed ne por ĉiuj. En Sovetio oni estas feliĉaj kiam oni havas 2-3 televidprogramojn. Kaj sufiĉas. La sovetiaj gravuloj jam anoncis ke ili malpermesos la televidsendojn el aliaj landoj pere de satelitoj. La radielsendoj okcidentaj kaj usonaj estas konstante

bruigataj. Laŭ kalkuloj, prezentitaj de "La rusa penso" (periodaĵo de la rusaj disidentoj Okcidente) Sovetio ĉiujare elspezas proksimume unu miliardon da dolaroj por brugi la okcidentajn radielsendojn. Jen kia patrina zorgado pri mensa sano de siaj infanoj! Do, brilaj perspektivoj por unuj, la kribrita, selektita, limigita informado por aliaj. Pri hejmaj "Minitel" aŭ similaĵoj oni eĉ ne revu.

Diskutante vi eluzis ĉiujn vortojn (manipulado, cerboŝtopado, mallibero). Demando : kiajn vortojn mi uzu por priskribi nian situacion?!

**P.S.** La iniciato de Japana Esperanto-Disvastiga Grupo estas salutinda. Mi nur jenon ne komprenas : kial oni ne sendu la kolektitajn "krudajn voĉojn" pri Ĉornobyla katastrofo al la sovetia registaro ? Ankaŭ al tiu de la Ukraina SSR (kiu estas ŝtato - membro de UNO, do, kun ĉiuj devoj kaj rajtoj de ĉi membreco sekvantaj)?! Des pli ke sovetiaj civitanoj ne rajtas "krudvoĉe" paroli pri agoj de sia registaro. Kiu protestas, tiu iĝos "kalumnianto", "perfidulo de Patrujo", "kontraŭsovetia agitanto kaj propagandisto" (ĉu rememorigi al vi lian baldaŭan itineron?). Kiu nur maltrankvile demandadas pri estonteco (aŭ eĉ : "kion trinki, kion manĝi?") estas "malkuraĝulo". Modas "herooj" - oni pretu morti, malsaniĝi, alkuri diversspecajn riskojn. Tiu estas vera civitano, inda nomiĝi sovetiano.

Dank'al heroeco la Ĉornobyla Atomcentralo baldaŭ denove ekfunkcios. Kaj kiu levos sian voĉon kontraŭ ?!

**Vira.**

-----  
Kelkaj klarigoj pri vortuzo :

1. Ukraino (li), Ukrainino (ŝi), Ukrainio (lando) - konforme al decido de ukrainaj esperantistoj en la 1913-a jaro (decido publikigita en revuo "Ukraina Stelo") kaj konforme al ĝenerala uzo en Ukrainio kaj en tuta Sovetio.
2. Ĉornobyl - konforme al la ukraina nomo de la urbeto (interalie, signifanta : "absinto").
3. La titolo de bonega libro de Petro Diksztejn estas - bedaŭrinde - malĝusta. Devus esti : "Inter popoloj de Sovetio", ĉar "soveto" estas rusa vorto signifanta "revolucia konsilio". Oni estas loĝantoj de la lando Sovetio, do, sovetianoj. Ĉu oni estas propraĵo de sovetoj (konsilioj)? Oni povas paroli pri sovetoj - membroj de respektiva soveto (vilaĝa, urba, respublika, Supera Soveto), pri sovetaj decidoj (t.e. decidoj

de soveto), sed, pri "sovetaĵoj" ? Krome, en Ukrainio "soveto" nomiĝas "rada". Sed ne tio gravas. En Esperanton eniris la rusa vorto, ĝi estu uzata ĝuste. **Vira.**

---

## PRI RELIGIO

Mi eldiras opinion pri la religio, ne kiel sciencisto aŭ tre edukita homo, sed kiel ordinara laboristo, profunde konvinkita ke ni vivas en sociordo maljusta kaj kruela. Por sin plifirmigi kaj eĉ porĉiamigi, tiu sociordo sin apogas kaj defendas per ege malprogresemaĵoj fortoj nomataj religio kaj ŝtato. Dum jarcentoj la morala deviga postulato de ĉiuj religioj bazitaj sur biblio estas : "Timu de Dio kaj obeu al la reĝo". Religio kaj ŝtato, man-en-mane, konscie baris kaj baras la ĝeneralan progreson (la kruelaĵoj kontraŭ Kopernik kaj Galilejo pruvas tion). La religio kaj ŝtato konscie baras la liberigon de la laborista klaso (la ekzisto de nuna sociordo pruvas tion).

Unue, kio estas Dio ? Laŭ PIV : "Ĉiu el la superhomaj estaĵoj, kultataj de homoj, pro siaj supernaturaj povoj, super homaro kaj mondo". "Estaĵo elpensita de la homa imago, por klarigi al si la ekziston de la mondo".

La difino, ke Dio estas elpensita de la primitiva homo por facile klarigi al si okazintaĵojn, kiel jenaj : inundoj, tertremoj, detruantaj ventegoj, fulmotondroj k.s., estas prava kaj ĝusta. Eĉ hodiaŭ, kiam tertremoj kaj fulmotondroj skuas la domojn, la religiemaj homoj iras antaŭ la ikonojn de siaj preferataj sanktuloj kaj kun nepriskribebla timo ke Dio volas puni ilin, pro malbona konduto, ili kun larmaj okuloj petas la sanktulojn mildigi la ĉiopovan Dion. Ili promesas ke ili ne plu pekos kaj eraros.

La timo de la elpensita Dio estas tavolo en la mensoj de la homo dum miloj da jaroj. Ni ĉiuj portas en niaj mensoj tiun abomenindan timon. Ni portas ĝin ĉar de la unua tago de nia naskiĝo, niaj patrinoj, avinoj kaj onkinoj preskaŭ konstante parolas al ni pri ĉiopova Dio, kiun ili neniam vidis.

Laŭ mi, la hodiaŭaj religiemaj homoj estas produkto de la timego de Dio, kiun la primitivaj homoj elpensis.

Kiam mi diskutas la ekziston de Dio kun tre religiemaj homoj, mi konstatas, ke la supre menciita timego estas en tiel granda kvanto, ke ili aspektas kaj agas kiel homoj sen mensa ekvilibro (tio estas persona konstato).

Ĉu tiu ĉiupova Dio ekzistas ? Laŭ mi, ne! Ne ekzistas eĉ plej eta pruvo, videbla-konstatebla, pri lia ekzisto. La defendo

de Dio estas farata per abstraktaĵoj kaj mistifikaĵoj. Ĉu la hodiaŭa homo povas kredi ke la kosmo estas kreita dum ses tagoj kiel la Biblio asertas ? Ĉu ni povas kredi ke la mondo estas sesmil jaraĝa ?

Ni la ateistoj rifuzas la religiajn abstraktaĵojn kaj stultaĵojn kiuj estas produkto de la timo de Dio. Ni akceptas la sciencajn pruvojn kiuj estas videblaj kaj konstateblaj (kiel ekz. ĉiujn sepdeksecajn jarojn la Halej-a kometo venas por diri al ni : "liberiĝu de via mensa timego").

Jen amuza okazintaĵo. Kiam mi estis 10-jara kaj mia frato 8-jara, nia amata avino banis nin kaj vestis nin en plej bonaj vestoj, ĉar la morgaŭan tagon Jesuo kristo venos sur teron. Mi, mia frato kaj nia avino iris al la herbejo ekster la vilaĝo, kien Kristo devis veni de la ĉielo. Atendinte ĝis malfrua vespero, kriston ni ne vidis. La pastro-mensogisto ĉirkaŭiris la homojn, sciigante ke Kristo estas tre okupata en la ĉiela vasteco kaj ne povas veni. Dubo okupis mian knaban cerbon. Ĉu Kristo, filo de Dio, estas malserioza kaj mensogema ? Ni konas lin, laŭ la preĝejoj predikoj, ke li estas la plej honesta kaj plej bonkora, sed li mensogas al ni. Kvankam estis nemezurebla mia amo al mia avino, mi diris al ŝi, ke Kristo mensogas. Ŝi preskaŭ frenezigiĝis pro timo, ke Dio punos nin, pro la ofendo al lia filo. Timo, timego regis la ekziston de mia neforgesebla avino. Timego estis ŝia pruvo, ke Dio ekzistas. Malgraŭ la supra, malsukcesa okazintaĵo, ŝi ne povis liberiĝi de la abomeninda timo. Ŝi mortis kun ĝi.

Ĉu la religiemaj SAT-membroj rajtas skribi religiajn artikolojn en "Sennaciulo" ? Ni ĉiuj havas la samajn rajtojn, kiel SAT-membroj, post akcepto de la statuto. Komprenoble ni ĉiuj scias, ke estas neskribita morala devo, nome : "Ne skribi stultaĵojn por **Sennaciulo**". Se la religiemaj membroj prezentas analizojn, konkludojn kaj pruvojn ke Dio ne estas elpensita de la primitiva homo, sed li ekzistas kaj estas tiel ĉiopova, kiel ili prezentas lin, ni akceptos kaj multe ŝatos iliajn artikolojn. Kaj inverse, se ili prezentas abstraktaĵojn pri la ekzisto de Dio kaj per stultaj alvokoj invitas nin obei al li, ni devas rifuzi iliajn artikolojn.

Vlado Kosef

---

Vizitoj de Laŭte-legantoj en Altenburg por mi ĉiutempe estas agrablaj. Skribu al : Hans-Georg Kaiser, DDR-7400 Altenburg, Wenzel-str.12.

## ĈU KONTENTIGA SOLVO ?

La transformado de skribmaŝinoj por tajpi supersignojn estas multekosta afero, kiun ne ĉiuj deziras aŭ povas fari. Esperanto povas disvastiĝi nur se ĝi estas simple kaj facile uzebla. Supersignoj estas ja ĝeno en nacia medio kaj grava malhelpo en internaciaj rilatoj. Tute ne eblas tajpi ekzemple pole aŭ hispane per franca maŝino, nek france per angla, ktp. Preskaŭ neniu maŝino en la mondo kapablas tajpi Esperante! Absurda paradokso por internacia lingvo. La solvo proponita de Zamenhof tro ŝanĝas la aspekton de la lingvo ; transformon de maŝinoj faros nur kelkaj ; restas nur la sola kontentiga kaj universala solvo : uzi internacie ekzistantajn literojn, tio estas meza solvo inter la malfacile uzeblaj supersignoj kaj la pezaj, malbelaj h-digramoj.

Ĉiuj plendas, ke mankas mono por reklami, propagandi, publikigi, kaj ni perdas monon aĉetante specialajn literojn, transformante maŝinojn, por ke Esperanto restu malfacile uzebla lingvo ! La akcepto de **q, w, x, y** por anstataŭigi **ŝ, ŭ, ĉ, ĝ** kostus nenion kaj multe faciligus la internacian uzadon.

P.M.G.

## PRI NOMBROJ

Nombroj kiel  $\sqrt{2}$  aŭ Pi havas ekzaktan valoron, kiun oni povas skribi en decimala formo per senlima serio da ciferoj. Tiu, kiu eraras en la kalkulado, prefere verku poeziaĵojn ol matematikaĵojn por solvi problemojn jam longe solvitajn !

Prefere ankaŭ studadi ne solvitajn problemojn : la eŭropaj lingvoj kaj Esperanto ne havas vere taŭgan sistemon por esprimi grandajn nombrojn. Anstataŭ la oficiala "klasika" sistemo : miliono, miliardo, biliono, biliardo, triliono, triliardo... ktp, oni ofte uzas la "usonon" : miliono, biliono, triliono...ktp. Erariga afero! unu (usona) triliono estas unu (klasika) biliono... ktp.

Kelkaj esperantistoj uzas duilionon anstataŭ biliono, ĉu tio solvas la problemon ? La aŭskultanto tradukas laŭ sia nacia kutimo... kaj miskomprenas. Ambaŭ sistemoj estas cetere limigitaj je la (tre) grandaj nombroj centiliono kaj centiliardo, respektive  $10^{303}$  kaj  $10^{603}$ . Ĉu oni neniam bezonos paroli pri pli grandaj nombroj? Tia limigo estas kontraŭ la logiko de sistemo de nombrado.

En la angla lingvo oni komencis solvi la problemon per novaj vortoj : googol =  $10^{100}$ . (ĉu "gugol" en E-o?) Oni krome rimarku

ke la <sup>17</sup> numeralaj radikoj de la metra sistemo estas limigitaj je  $10^{18}$ , estas komplike malsamaj por oblat kaj onaj nombroj kaj havas ofte tute alian sencon en Esperanto : dec-, kil-, pet-pik-, ter-...

Logike, per dek bone elektitaj radikoj oni povus senlime nomi ĉiujn grandajn nombrojn laŭ dekuma sistemo. Ĉu eblas en Esperanto, por ke ĝi superu la aliajn lingvojn en tiu kampo?

P.M.G.

## SCIU, KE...

1. Ĉirkaŭ **2620** anglo-devenaj vortoj penetris en nian francan lingvon, el kiuj **1500** tre vivoplenaj. (Laŭ LE MONDE, 8/7/86. Bertrand Poirot Delpech)

2. En artikolo aperinta en **Sennaciulo** (Januaro 1972), p.7, sub titolo "La sintrudo de la angla lingvo en la japanan", la aŭtoro MILDWURF skribas :

"Unu aŭtoritatulo taksis, ke Japano bezonas scii minimume **2500** "garaigo" (= vortoj venantaj el eksterlando) por legi gazeton inteligente aŭ aŭskulti radion aŭ televidon. Sed kulturita homo devas mastri 3159 (!) fremdajn vortojn pliajn, do entute ĉ. 5600.

... Plej multaj anglaj vortoj estas "japanigitaj, tiagrade ke ili estas apenaŭ rekoneblaj por anglo."

La angla "table" fariĝis : "teeburo". Building = buridingu (mallonge : biru). Steak (bifsteko) = suteiki, ktp... Komprenoble tiuj vortoj estas des malpli rekoneblaj, ke ili estas skribitaj per "katakana" alfabeto, kaj eĉ kelkfoje per ĉinaj skribsignoj.

Lentaigle

## NIA KRIMINALA FELIETONO

Joël THIMEUR estas vere bonŝanca : ĉar kazerno ne estas loko, kie oni povas facile lerni esperanton, la franca justico trovis por li lokon en dulita ĉambro kun tablo, kie li povas trankvile lerni nian belan lingvon. Do ni helpu al li ! Estas nur eta problemo : la ĉambro estas ŝlosita de ekstere.

Jen kio okazis : Joël pretis anstataŭigi unu jaron da soldatservo per du jaroj da civila servo. Tiun eblecon donas franca leĝo. Bedaŭrinde, Joël ne estis komplete informita pri la proceduro antaŭvidita de tiu leĝo. Alveninte al la kazerno, li petis la statuton de soldatservrifuzanto. Oficiro klarigis, ke tiu statuto ekzistas, sed ke estas jam tro malfrue por ĝin akiri, ĉar la

peton li devus fari antaŭe. Li ordonis al Joël surmeti unifotmon. Joël rifuzis. Oni portis lin al tribunalo, kiu kondamnis lin al unu jaro de mallibero.

Joël jam plenumis la duonon de sia puno, tial li faris peton por kondiĉa liberigado, kiel antaŭvidas franca leĝo. Oni respondis al li, ke la kondiĉo por lia liberigado estas, ke, forlasinte la malliberejon, li tuj iru al la kazerno por finfine fari la soldatservon. Ĉar li rifuzis, li nun devas resti mallibera ĝis la fino de la puno. Eble necesos remencii lin en ĉi tiun aĉan felietonon, ĉar ne estas certe, ke post plenumado de la tuta puno li estos liberigita el la devo soldatservi. Pri tio komisiono baldaŭ decidus. Se ĝi rifuzos lin liberigi de tiu devo, la armeo povos lin rekonduki al kazerno, li denove rifuzos, estos dua proceso, ktp, ktp, ĝis elĉerpiĝo de la armea stulteco, kio bedaŭrinde estas tro granda por povi elĉerpiĝi rapide.

Adreso de Joël : Joël THIMEUR, N° 11285 cel 418 C, Maison d'arrêt d'Amiens 85 avenue de la Défense passive, BP. 3005, F 80030 AMIENS CEDEX, Francio. Nuna situacio : Lia liberigado estas antaŭvidita por la 7a de januaro 1987.

Laŭ informo aperinta en la informbulteneto "Avis de Recherche", Bruno Poirier estas en malliberejo pro sia rifuzo soldatservi. Arestita proksimume samtempe kun Joël, li estis kondamnita al 15 monatoj (Joël "nur" al 12 monatoj). Lia adreso estas : Bruno POIRIER, n° 22255, Maison d'arrêt de Gradignan, 17 rue de Chouiney, F 33170 GRADIGNAN.

### **KULTURA ESPERANTO-DOMO GRÉSILLON, F 49150 BAUGÉ**

La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 17-hektara parko. Ĉiujare ĝi organizas : kursojn diversgradajn, prelegojn diverstemajn, distraĵojn diversspecajn, ekskursojn en belega regiono. Ĝi disponigas al la restadantoj : kurso-ĉambrojn, riĉan bibliotekon, riĉan libro-servon, salonojn, interresan "butikon", sport-teronon.

Jam vizitis ĝin miloj da gesamideanoj. Ĉu baldaŭ vi ?

#### **Kulturaj aranĝoj 1987**

Aprilo : 19/25 : Internacia Renkonto de Infanoj  
Junio : 14/30 : Internacia renkonto (kursoj, distraĵoj)  
Julio : 2/16 : Prelegoj kaj Kursoj  
16/22 : Altnivela Semajno  
Aŭgusto : 23/7-13/8 : Someraj Kursoj  
13/30 : Lernado, praktiko, turismo.

Detala programo aperos en novembro. Jam rezervu datojn. Skribu al : Esperanto-Domo, Grésillon, F 49150 Baugé, Francio.

- Pascal DUBOURG -

### **ESPERANTISTA MOVADO EN ITALIO ĈU GRAVAS NUR ITALA ESPERANTO-FEDERACIO ?**

Komence de la 86-a somero mi veturis al Italio. Tie mi celis renkonti kelkajn movadajn respondeculojn por informiĝi pri la fartstato de esperanto en suda lando, tiel ankaŭ eblis kompari kun la situacio, kiun oni travivas en Francio. Ĉu la bunteco kiu ŝajnas kvazaŭ posedaĵo de la franca movado, estas trovebla ankaŭ aliloke ? Tio estis la ĉefdemando, kiun mi tiam kunportis. Mi provis intervjui kiel eble plej multe da homoj. Ĉio okazis sen malfacilaĵoj. La Italaj respondeculoj ne estas nekontakteblaj, nek ĉiam zorgantaj pli gravajn aferojn ol vian. Ili respondas viajn demandojn rekte, klare, foje sprite. Sed tion ili ŝuldas al mediteraneeco. Ili ĉiuj tre fieras pri la propra afero, kaj ofte kritikis, sed bonhumore, alies agadojn.

Kiel en multaj landoj, la ĉefa organizaĵo estas la nacia filio de UEA, la Itala Esperanto-Federacio, kiu unuigas ĉirkaŭ 50 lokajn grupojn. Por ke la nomo Federacio meritu citon oni provis antaŭ nelonge organizi la aferon laŭ provincoj. Sed ĝi ne ĉie sukcesis. En juna unuigita lando, homoj plej timas centralizismon. IEF akiris juran personecon (l'ente morale), kiu laŭ Antonio De Salvo, juristo kaj eksprezidanto de la asocio, estas bonega vizitkarto. Ĝi ebligas seriozan pritraktadon far aliaj organizaĵoj, kaj bonan progreson sur oficiala kampo. Sepdeko da parlamentanoj membras en la grupo Amici dell'esperanto, kelkaj italoj ankaŭ membras en la eŭropa grupo por esperanto. Kvankam estas tre malfacile en Italio, oni sukcesis enkonduki oficiale kurson pri "Esperanto kaj Interlingvistiko" en du universitatojn : Torino kaj Trentino. Mankas la instruistoj sed la plimulton oni jam faris, ĉu ? Aliflanke la agado de IEF tre similas al tiu de UEA-filioj en aliaj landoj : varbkampanjo por instruistoj, vendkampanjo por bibliotekoj, realigado de portelevida kurso, semajnfinaj kursoj, leĝproponoj, surfoiraj budoj en Milano, Trieste, Gorizia, fakaj kontaktoj. Kelkaj bone sukcesis, ekz. la faka revuo "Le lingue del mondo", jam aperigis kurson kaj informojn. Laŭ iniciato de IEF fondiĝis kooperativo por eldonado de esperantaĵoj, kiu jam eldonis italan PIV, tradukaĵon de roma poeto Belli, gramatikon... Laŭ Renato CORSETTI, prezidanto de IEF, la plej granda problemo, kiun IEF trafas, estas pri homaj fortoj ; monon oni trovas kiam oni petas. Venontjare dank'al donacoj IEF povos anonci tutpaĝon en "Il Corriere della

Sera", unu el la plej gravaj Italaj gazetoj. Emfazas Alessandro PERNA, junulara respondeculo : **Mankas al ni instruistoj kapablaj, sen ili oni ne povas efike propagandi, kaj la homoj kiuj kapablus instrui, ne povas ĉar ili respondecas alie en la movado.** Sed laŭ kelkaj, kia De Salvo, pli indus kuraci kabeigon ol varbi vastskale, serĉante ties verajn kaŭzojn. Tamen IEF povas fieri pri unu el la plej grandaj membraroj de okcidenta Eŭropo. La aferon klarigas CORSETTI : **Ne ekzistas vera alternativa movado en Italio kiel en Francio. Nur deko da esperantistoj ne aliĝas la asocion sed ili estas ĉiam kverelantaj.** Eĉ se PERNA bedaŭras, ke ili estas ĉiam pli kaj pli. Sekve kiel signifklarigi la kreigon de Itala Interlingvistika Centro en Milano, kiu eksplodigis veran fulmotondron sur la kolonoj de "L'ESPERANTO" (oficiala organo de IEF). Ĉu IEF tiom timas konkurencon, eĉ se la prezidanto de IIC, Marco PICASSO, ne konsentas kun la vorto konkurenco : **IIC ne intencas konkurenci IEF, neniel. Niaj planoj kaj celoj estas malsamaj. Ni deziras varbi sed ne iujn ajn, kaj ne iel ajn.** Ĉu tiu nova forto en la itala movado streĉigos la fortojn aŭ ne ? Ĉu okazos kiel en Francio ? Baldaŭ oni povos respondi, almenaŭ post la jubileo.

#### R.A.I.-ESPERANTO, KUTIMA VIVO DE ESPERANTLINGVA ELSENDEJO

Radiotelevisione Italiana - Servizio Internazionale.  
Esperanto-Fako Dro Antonio DeSALVO, respondeculo.

RAI elsendas en esperanto unufoje semajne, sabate vespere, je la 21a, mezeŭropa tempo. La elsendo daŭras dudek minutojn. La afero startis antaŭ kvindek jaroj, do preskaŭ ĉe la komenco de la internacia radio-dissendado. RAI elsendas en aliaj 24 lingvoj tutmondaj. Ĉiusabate kerno da fidelaj aŭskultantoj grupiĝas ĉirkaŭ fortaj riceviloj. La elsendo ne estas tre facile aŭskultebla, kvankam teorie tutmonde. La ilaro de RAI estas grandparte malnova kaj la elsendloko estas maltaŭga loko : Strato Smeraldo, kie antaŭ kvindek kvin jaroj, kiam oni organizis ĝin, estis granda sovaĝa herbejo eksterurba. Nun la suburbo disvastiĝis kaj proksime de la grandaj elsendturoj oni konstruis ankoraŭ pli altajn loĝ- kaj oficej-palacojn. Tiuj domegoj sorbas la plimulton de la ondoj. Tamen RAI-estraro planas modernigi baldaŭ la materialon. Kiam vi ŝaltas la ricevilon, aŭdiĝas laca voĉo, kiu rekte tradukas itallingvan tekston esperantlingven. Tio pro manko de tempo. Jes, Antonio De SALVO zorgas la esperantan fakon de RAI de antaŭ dekkvin jaroj. La parolistoj ĉe RAI estas pli tradukistoj ol ĵurnalistoj,

ili devas elekti inter tekstoj verkitaj de la profesiaj ĵurnalistoj. La itala leĝo ebligas memverkadon de artikoloj nur al plentempaj ĵurnalistoj. Ofte la aŭskultantoj petas plioftigadon de la elsendoj esperantlingvaj, almenaŭ la verkintoj de la 400 ĉiujaraj leteroj por la esperanto-fako. Sed aliaj aferoj malhelpas la disvolviĝon de RAI. La duoblaj interferoj estas oftaj kontraŭ RAI. Moskvo kaj aliaj intence interferas kaj aliaj kiel RADIO KAIRO estas samfrekvencaj kiel Romo. Sed post du jaroj okazos nova distribuo de frekvencoj sur internacia nivelo kaj tiam RAI petos pli da frekvencoj kaj malpli da interferoj...

Intervjuis **Pascal Dubourg**  
kaj raportis en Romo la 20an de junio 86a.

#### LA FLORO DE L'AMIKECO

*La suno alradiis min kiel ĝoja ondo,  
La tero satigis min kiel miela kuko.  
Mi havis la kapon flora, la koron bunta  
kaj mia korpo lumis sur la roso ĉiela.  
Miaj manoj estis kvazaŭ la libelo  
Desegnanta en la lazuro orajn arabeskojn.  
Miaj okuloj estis kvazaŭ la lunklaro  
Semanta en la nokto stelajn diamantojn.  
Mi deziras preĝe kanti,  
Amvortojn eksplode krei.  
Miaj lipoj nur rozon karese plukis ;  
Mi ĝin al vi ĉiuj tutkore oferis.  
Ĝia parfumo vin ebrigu  
Kiel amikeca blovo !  
Ĝia beleco vin lumigu  
Kiel espera himno.*

**Michèle Freud**

Necesas akcepti la estulojn per bonvolemo kaj malavareco. Nia antipatio aŭ nia malinklino por homo aŭ por spektaklo venas plej ofte el tio, ke ni ne donas al li aŭ al ĝi la tutan atenton necesan por malkovri tiun, kiu estas aminda. En nature afabla homo, percepto estas jam ago de simpatio. Kaj li ĉiam povas eltrovi ion kortuŝan, interesan, en la plej senĉarma kreito, en la plej malfavora loko el la mondo. Charles Vildrac, franca verkisto, esprimis tiun opinion en jena poemo titolita :

**"Pejzaĝo"**

## PEJZAĜO

Estis vere loko kie la tero  
Malsanas kaj malriĉe aspektas :  
Skoriaj vojoj, ŝtonamasoj kaj kotaj kavaĵoj.  
La arbetoj, kiujn oni tie plantis,  
Estis jam malvivaj sur tuta flanko.  
Oni ankoraŭ vidis, inter la luzernoj,  
Malaltan uzineton, kies tubo  
Per rompiĝema eksvingo sputis sur la ĉielon.  
Malgraŭ la koralaj nuboj  
Ŝvebantaj en la aŭrora firmamento,  
Estis vere mizera pejzaĝo.  
Tamen, sufiĉe serĉante, ni trovis  
Bonan lokon de graso herbo ;  
Sufiĉe aŭskultante, ni trovis  
Bruon de foliaroj kaj arpeĝojn de birdoj.  
Tamen, se la lumo orlumigis nian koron,  
Ni povis peti de la vento  
Ebruigajn parfumojn kaj bluetajn muzikojn,  
Ni povis malkovri la flambrikan ludon  
De la suno en la glimetantaj verdaĵoj,  
Kamparojn en serena ekstazo.  
El tie oni tamen povis kunporti  
Memoraĵon de la riĉa tero,  
Memoraĵon tufan kiel stelbukedo,  
Tiom daŭran kiom la kantoj de la infaneco,  
Kaj penetrantan kiel la eĥo.

Charles **VILDRAC**

Nu, ni havu sufiĉe da amo, tio estos la fonto de nia riĉeco...

La spirito de Sacha Guitry :

\* *Endas, ke fine iam mi decidu eklegi la librojn, kiujn, de tridek jaroj, mi konsilas al miaj amikoj legi.*

\* *Mi pretendas ne al ĉiu plaĉi.*

\* *Mi estas libera havi opinion - kio ja tre bonas - sed mi ŝatus esti libera ankaŭ havi neniun.*

\* *La malmulton, kion mi scias, al mia nescio mi dankas.*

\* *La altan kalkanumon elpensis virino, kiu ne plu volis esti kisata surfrunte.*



## JUBILEA E-KONFERENCO GRAZ 1987

La Konferenco okazos de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987 sub la ĉefa temo "**100 Jaroj de Esperanto-Kulturo**". La Konferencejo estas la Universitato de Graz. Plej kompetentaj lekciistoj pritraktos diversajn aspektojn de la ĉeftemoj, inter ili D-ro André **Albault**, S-ino Marjorie **Boulton**, Prof. D-ro Ivo **Lapenna**, Prof. D-ro Paul **Neergaard** k.a.

Unu el la ĉefaj programeroj estos la inaŭguro de la skulptaĵo "La Espero" de Jesper Neergaard kiel monumento al la 100-jara Jubileo de Esperanto. Al la kostoj kontribuis la urbo Graz kaj multaj donacintoj el la tuta Esperanto-Movado, kiuj ricevos belan memordokumenton.

Alia programero estos la malfermo de ampleksa ekspozicio de E-literaturo, kiun organizos la Stiria Landa Biblioteko en salonego en la urbocentro de Graz.

**Internacia Honora Komitato** por la Konferenco estas formita laŭ iniciato de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Inter la pli ol 20 membroj troviĝas D-ro André Albault (Francio), Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Prof. D-ro Stefanos C. Anagnostakis (Grekio), Prof. D-ro Paul Ariste (Soveta Unio), Prof. D-ro Helmar G. Frank (FR Germanio), Sir Ernest Goulding (Britio), Prof. D-ro Otto Haszpra (Hungario), Prof. D-ro Geraldo Mattos (Brazilo), Prof. D-ro Vasil Peevski (Bulgario), Prof. D-ro Fabrizio A. Pennacchietti (Italio), Prof. D-ro Bojidar Popoviĉ (Jugoslavio), Prof. D-ro Chen Yuan (Cinio).

### Pri la piedmigrado en Trescléoux (Altaj Alpoj), Francio

La celo de tiu ĉi restado estis renkontiĝo de esperantistoj kun neesperantistoj en simpatia kaj malstreĉa etoso. Ceestis 21 partoprenontoj : 9 e-istoj el Melun, Nice, Grenoble, Avignon kaj Eysines, 12 neesperantistoj el Bordeaux kaj Eysines (Girondio, F).

Ĉiutage ni piedmigradis malkovrante la belegan regionon. Ĉiuvespere okazis animado, inicado pri esperanto, konversacio por la progresantoj, kantoj kaj popoldancoj.

La tutan semajnon restis ekspoziciita E-materialo (libroj, propagandiloj, ktp). Ni multe dankas Mikaelon de la Nice-grupo, kiu vigle animis la vesperarangojn, kaj la gerespondeculojn de la etapkuŝejo.

Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj ĉe : Lucette Lacoste, Gîte d'étape du Mont-Garde, Trescléoux, F 05700 SERRES. tel:92.66.25.72.

#### La Ejin-grupo.

Interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn el la tuta mondo :  
Jesuo PEREZ, PK. 280, E-11380 LA LINEA (Cadiz), Hispanio.

#### "LA KANCERKLINIKO" estas DEKJARA

Kvankam daŭre politika, kultura, skandalema, ajnista, pli ol 150 fam- aŭ baldaŭ famkonataj verkistoj kontribuis al la sukceso de tiu sendependa revuo.

Duc-Goninaz, W.Auld, R.Corsetti, Z.Heide, D.Lister, R.de Jong, K.Long, P.Thorsen, Lorjak, A.Brennan, B.Ragnarsson, R.Rossetti, CRL.Power, G.Cappa, N.Saletti, A.de 'Giorgi, Lo Jacomo, JP.Danvy, B.Golden (ĉu?), LG.Nordenstorm, W.Zelazny, C.Nourmont, T.Tyblewski, R.Cash, A.Cherpillod, G.Lagrange, I.Nagy, H.Gonin, S.Sire...estas ja famkonataj.

LL. da Silva (Brazilo), A.Sidworke (Britio), S.Hideg kaj I.Ertl (Hungario), Benito (FRG), J.Exmann (Nederlando), JL.Azra (Francio), Jozo (Jugoslavo), H.Ashe (Usono)... estas nomoj, kiujn vi baldaŭ ĉiuj konos kaj aprecos.

La n-ro 40 - okt/nov/dec - (+ la "KROM" kun "La Stilekzercoj" de R.Queneau entute tradukitaj de I.Ertl) ampleksos 90 paĝojn. Daŭre kundirektoras Ĵak LE PUIL/Laŭrenco SEPTIER. Abono por 5 sinsekvaj n-roj : 80 FF al Le Puil, pĉk Paris 12 729 73X aŭ UEA Klik-g.

#### Internacia Esperanto-propaganda biciklado tra Eŭropo

Pro centjariĝo de nia I.L.o, internacia grupo bicikle foriros ekde februaro el Perpinjano (Sud-Francio) por atingi Jubilean Universalan Kongreson en Varsovio fine de julio. Ĉi tiu alvoko petas de ĉiu Esperantisto anonci plej frue kiel eble

\* unuatempe ĉiujn informojn pri jam organizotaj E-aranĝoj, renkontiĝoj, kongresoj, ktp..., kiujn la biciklontoj povus partopreni

\* duatempe ĉiujn informojn pri organizotaj neesperantaj - sed tamen internaciaj - renkontiĝoj, kie la IL-o rajtos esti diskonigata (revidi UNESKO-alvokon al neregistaraj organizoj internaciaj, pri centjariĝo de Esperanto, por disvastigi ĝian uzadon).

\* triatempe, kiuj Esperantistoj/Esperanto-grupoj pretiĝas aranĝi renkontiĝon ĉefe per antaŭaj anoncoj de lokaj ĵurnalistoj por publika diskonigo de la grava evento "Centjariĝo de Esperanto", kaj de la tiutempa trabiciklado de la regiono fare de diverskontinentanoj esperantistaj kaj neesperantistaj, kiuj deziras plifacilajn eksciiĝon kaj lerneblecon de E.

Kiu vojiro ??? Bonvolemluloj foriros el Perpinjano en :

- Februaro : 1500/3500 km tra Hispanio kaj Portugalio  
certe estos en Francio komence de :

- Aprilo : 1000/4000 km ĉefe en Sud-Francio kaj poste, se eblos, en iomaj partoj de Italio kaj Svisio, norden ĝis (kial ne?) Danlando... laŭ la baldaŭaj respondoj al ĉi tiu alvoko.

La grupo petas, ke oni sin anoncu kaj bonvenigas ĉiun kunpedalontan homon (ĉu E-istojn, ĉu neesperantistojn, ĉar kompreneble E-kursoj okazos laŭ la vojrajdado). Diru al ni en kiu urbo vi loĝas kaj dum kiom da tagoj vi biciklos.

Por ĉiuj respondoj antaŭ la 1-a de decembro, ni certigos la ĉefajn urbojn/vilaĝojn trapasotajn kaj la ĉefajn renkontiĝojn (do datojn) partoprenotajn. Tiel ni precizigos kiun tagon ni pretos halti en iu urbo/vilaĝo laŭ organizeblaj konferencoj aŭ spektakloj (laŭ la datoj de lokaj E-istoj, de biciklantoj kaj de la loko..., ĉu E-biblioteko, ĉu kampadejo, ĉu strato Zamenhof, ĉu... ĈIO ESTAS EBLA !)

La Esperanta lingvo bone funkcias kiel internacia komunikilo. Ni pretas tion elpruvi. Nescii ne estas malbone. (Ek)scii estas bone. Sciigi estas bonege. Ni petas, tuj anonci ĈION al : JORGOS, 12 Pl. Picasso, F- 66400 CERET. Biciklontoj, bv. aldoni i.r.k.-ojn. Antaŭdankon.

Ĉiu rajtas traduki kaj multobligi ĉi tiun anoncon. Neniam ni sufiĉe informas, nek sufiĉe frue.

P.S. - Ankaŭ B.E.M.I. (Biciklista E-Movado Internacia) proponos bicikladon de Parizo ĝis Krakovo ekde la 25a de junio. Ni provos kunpedali... Ankaŭ de ĉi tiu flanko informoj grave mankas !

INFORMU NI ! BICIKLU NI ! ESPERANTIGU NI !!!

#### 79-a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO

... okazos ĉe la lazura marbordo en LA GAILLARDE apud FREJUS-ST-RAPHAEL de la 5-a ĝis la 9-a de Junio 1987, dum Pentekosto.

Por digne festi la jubileon de Esperanto, ni elektis kongresurbon en feria kadro : temas pri restadejo apud la maro, situanta 10 kilometrojn sudokcidente de **St Raphaël** ĉirkaŭita de arbaraj montetoj. En la sama loko vi disponos pri kongresejo, loĝejo kaj restoracio sed ankaŭ pri tenisejo, naĝejo, pilkludejo, sen paroli pri la maro trans la strato, aŭ eblaj

promenadoj en la montoj. Ĉiu ĉambro estas dulita, kun duŝejo, fridujeto kaj kafmaŝino. Pluraj estas speciale atingeblaj per rulseĝoj. Por tiuj, kiuj preferas tendumi, proksima kampadejo povas ilin akcepti kun ebleco mendi varmajn pladojn en la kuirejo aŭ aĉeti en magazeno mempreparotajn manĝaĵojn. La loko estas tiom alloga, ke ni suspektas, ke eble vi ŝatos ferii tie ankaŭ antaŭ aŭ post la kongreso : ni aranĝis, ke por tiuj "ekstraj" tagoj vi havos rabaton: taga restado kostos al vi 250 FF.

La programo entenos krom la laborkunsidoj distrajn vesperojn kaj balon, debaton, prelegojn kaj ekskursojn.

Petu pliajn informojn, aliĝilon-mendilon al : ESPERANTO, Tour Vadon A, F 83700 SAINT RAPHAEL.

### En Parizo :

#### RADIO-ESPERANTO : 5-JARA !

La unuan de Oktobro 1981, en la kadro de Radio-Libertaire, okazis la unua elsendo en Parizo de RADIO-ESPERANTO. Ĝi elsendas senĉese de tiu momento ĉiuvendrede. La tekniko uzata (modulata frekvenco) permesas kapti ĝin ĝis 30 km-oj ĉirkaŭ Parizo. Estas loka radio. Oni ne povas aŭdi ĝin en Berlino aŭ Bonaero... Ĝi provas informi la ĝeneralan publikon pri Esp-o, pri la esperanto-kursoj, ktp, kaj peras kiel ligilo inter la esp-istoj, kiuj loĝas en la pariza regiono. Sur la anteno ni diskonigas ĉiujn diskojn, kasedojn ellaboritajn de la E-movado, kaj ĉerpas informojn el la tutmonda gazetaro. Se vi deziras, ke ni konigu viajn agadojn, gazetojn, librojn, k.a.... vi povas sendi ilin al nia adreso.

Kelkaj utilaj informoj :


- Societa sidejo : 145, rue Amelot, 75011 PARIZO
- Telefono de la sidejo : 48-05-34-08
- Telefono de la elsendejo : 42-62-90-51
- Ondolongo : 89,5 Megahercoj.
- Nova horaro : ĉiuvendrede inter la 18a kaj la 19a.

#### 9a internacia laborsemajno en Habère Poche

Kiel L! anoncis, ĝi okazis en septembro en tre bela kaj agrabla regiono apud Thonon kaj havigis al si plenan sukceson. Kiel kutime, krom la kursoj ni ĝuis agrablajn aranĝojn : montarajn promenadojn, folklorajn dancojn, teatraĵetojn, lumbildojn kaj filmojn, ktp. Claude Piron najbare vizitis nin, kantis por ni kaj paroladis pri Ĉinio kaj Japanio por nia granda plezuro.

Apartan koran dankon al S-ino Vierne, kiu ĝin organizis nome de la E-grupo de Montpellier. Pripensu ferii en sama epoko venontan jaron por ke ankaŭ vi uzu esperanton en agrabla etoso, verŝajne en Sète. Partoprenintino

Rose



## EKOLOGIA CENTRO INTERNACIA kun Esperanto kiel oficiala lingvo

Evoluo dum la unua duonjaro de nia asocio

Post nia vojaĝo tra Sudfrancio en aŭgusto 1986, dum kiu ni esploris surloke diversajn proponojn kaj sugestojn de eblaj sidejoj por MH, kiel ekzemple Centre Ecologique Européen, apud Alès, kaj Cun de Larzac, ni konsideras la proponon koncerne bienon en la preskaŭ forlasita vilaĝo Cauduro, inter St-Pons kaj St-Chinian (Béziers), kiel la plej taŭgan, kaj preparas kontrakton pri kunlaboro kun la posedanta asocio, pri kiu ni informos detale en venonta raporto.

La konstato, ke ekzistas multaj simpatiantoj, kiuj pro financaj aŭ aliaj kialoj ankoraŭ ne volas esti plenaj membroj de MH, movis nin krei aldonan aliĝeblon, nome kiel membro apoganta, paganta nur 50 FF. Membroj apogantaj rajtos uzi MH samkiel la plenaj membroj, sed ili ne havas decidpovon pri asociaj aferoj, kiel ekzemple la elekto de la estraro. La unua jara kotizo (20 FF) estas entenata en la apogkotizo. Pagante la diferencon inter 50 FF kaj la plena aliĝkotizo, la membroj apogantaj povos ĉiumomente iĝi plenaj membroj.

Koncerne la pagon de pli alta aliĝkotizo ol la normala, la asocio konsideros kaj kvitancos la diferencon ne kiel definitivan kapitalparton, sed kiel prunton seninteresan, tiel ke kiam bona financa situacio permesos tion - aŭ male en okazo de malsukceso - tiu mono restos je la dispono de la donintoj.

\*

Ĉar la plej granda urba Mondhejmo-grupo loĝas en Hamburgo, ni volas renkontiĝi tie de la 26-a de decembro ĝis la jarfino. Ĝis nun ni estas 2 membroj apogantaj kaj 22 plenaj membroj (entute 11 virinoj kaj 13 viroj) el Belgio, Francio, Germanio (FRG) kaj Hispanio, el kiuj estas 14 E-parolantoj kaj 10 E-komencantoj kaj simpatiantoj.

Tendenco : Koncerne la fundamentajn aspektojn de nia asocio, ĝis nun estas Esperanto pli forte reprezentata ol la ekologio. Kiel alia grava aspekto, ŝajnas al la raportanto, ke la humaneco estas la plej forta flanko de niaj membroj.

Rilate nian nombron, certe ni povos varbi pli rapide novajn membrojn, kiam ni disponos pri definitiva sidejo ; tamen, laŭ la nuna stato, ŝajnas, ke ni havos malmultajn sed aktivajn kaj helpemajn membrojn pli facile ol grandan nombron da pli-



malpli pasivaj membroj.

Por atingi ne-esperantistajn interesotojn ni disponas pri franca, germana, kastilia, kataluna kaj en preparo angla kaj itala versioj de nia E-originala informilo.

Pluaj informoj ĉe : Akiles Sanz / Hafenplatz 6  
D-1000 Berlin 61.

**ESPERANTO-KOLEKTANTOJ**, ĉu vi scias, ke ekzistas E-Ligo Filatelista, kun organo "La verda lupeo - Fenikso" ? Ĝus aperis la 69a numero, 16-paĝa, kun multaj informoj kaj fotorepresaĵoj de E-stampoj kaj glumarkoj. Adreso : Ivar Paulsson, Skytteholmsv. 29, S-171 44 Solna. Poŝtkonto : 51 57 85-4, Paulsson, Solna, Svedio. Kolizo : 15 irpk aŭ 45 s.kr.

## SAT-Broŝurservo plu eldonadas freneze !

**ĜUS APERIS** (iom pli frue ol anoncite) :

\* **La Konflikto** (F. Le Dantek) + **Dubi** (elektitaj artikoloj de Alain - ALEN), el la franca trad. E.LANTI.

Mendkodo : LK, 136 paĝoj, 20 FF

\* **Filozofio Zoologia** (Lamark) el la franca trad. Valo.

Mendkodo : FZ, 138 paĝoj, 20 FF

**ATENTU !** Estas elĉerpitaj multaj el la pli ol 140 iam eldonitaj titoloj. Ni petas pardonon de nekontentigeblaj mendintoj. La nun valida listo estas tiu, ĉi-poste aperanta. Vi povas profiti de la reabon-sezono por samtempe mendi el la ankoraŭ disponebla stoko.

**EBLAS RICEVI ABONE** aŭtomate ĉiujn novaĵojn kun 20%-rabato, kaj tiel kuraĝigi la plueldonadon. Jen titoloj el la venontjara (re)eldonprogramo :

\* **La Mortula Ŝipo** de B.TRAVEN (romano)

\* **Esprimaro Franca/Esperanta** de L.BOURGOIS

\* **Kiel diri...?** de LENTAIGNE (reldono)

\* **Leteroj de LANTI**

\* **La Ribelo** de J. ROTH (romaneto)

\* **Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela Boldura** de Viktoro HUGO (trad. de Valo)

\* **Esperanto per INTER-metodo** de A.SLANINA

Pro la amplekso de la programo, ni petas pardonon de posedantoj de manuskriptoj, kies publikigon ni ne povas nun entrepreni.

Kribo

## LISTO DE SAT-BROŜURSERVO

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
AA. La Aperoĵoj de Ahasvero (Han Riner)	18
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	6
AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka)	3
AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta)	4
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	1
AR. Argentina Novelaro (18 noveloj)	18
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	18
BG. La Blankaj Gardistoj (Heiligstein) por infanoj	6
BU. La racia kaj ateista budhismo	4
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio (*)	25
DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)	3
EA. Esperanto in 24 pages (angla)	1
EF. Espéranto de poche + Les 16 règles	6
EH. Esperanto en 24 paginas (hispana)	3
EI. Esperanto su 24 pagine (itala)	3
EK. L'Esperanto en 24 pagines (kataluna)	3
EL. Elektro de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	12
ET. Etiko I (Kropotkin)	12
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	4
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	4
FV. Fronte al la vivo (Krishnamurti)	4
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) gvidlibro E/Fr.	8
FZ. Filozofio Zoologia (Lamark)	20
GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne)	7
HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis)	3
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	4
IN. La individualisma socialismo de D-ro A.Robertson Protschowsky (Lagalaure)	2
JA. Jaro 2000 (H. Muller) romano pri disdona ekonomio	30
KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	4
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	15
KF. Kontraŭflue (Valo)	10
KI. El la kara infaneco... (Valo)	12
KK. Komuna Kantareto	2
KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Verdikto pri Wyhl (atomcentraloj)	5
LA. Lingvaj Anguloj (Baronnet)	8
ME. Mistero de nia surtera ekzisto (Archdeacon)	4

(\*) "Kiel diri...?" (DI), nun elĉerpita, estos reeldonita venontjare.

LE. La laborista esperantismo (Lanti)	3
LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr.Lanti	20
MB. Imaga dialogo Marks/Bakunin (Cranston)	4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse)	8
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman Gonzalez)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l' uzado (L. Bourgeois)	12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	6
PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	3
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin)	5
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SA. Kio estas SAT ? (H.Masson)	3
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	10
SN. Sveda Novelaro	30
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	4
TD. Tiel diru! (Lentaigne) suppl. de DI por francoj	20
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VA. Varsovio 1887 (Lopez Luna) romanigita biografio de Zamenhof	12
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	10
VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner/tr.Lanti)	18
VL1. <u>Verkoj de Lanti 1.</u> (Adamaĵoj, ekstraktoj el Leteroj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo)	20
VL2. <u>Verkoj de Lanti 2.</u> (3 semajnojn en Rusio, Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	20
VL3. <u>Verkoj de Lanti 3.</u> (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	18
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (prelego de A. Caubel)	4

Mendi al : Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut  
Poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux (sama nomo kaj sama adreso)

--- ĉiuj aliaj titoloj estas elĉerpitaj ---

## KRUCVORTENIGMO de Sfinksido (C.Cavalié)

### Horizontale :

1. - Tia pasejo estas plejofte zorgata de barieristo. 2. - Inerteco, maldiligenteco (s.f.). 3. - Aspekto. - Akordigi finojn de versoj laŭ samsoneco. 4. - Enĉambra litniĉo. - Piktura genro (s.f.). 5. - Malpliigis kun la posedo (laŭ la proverbaro)(s.f.). - Ĝi logas kaj mensogas (same). 6. William Auld, ekzemple (s.f.). - Preni, kapto. 7. Kankro sen vosto... - Literumante : taĉmento.

8. Interjekcio uzata ĉe la telefono. - Kvalifikas ian terapion. 9. - Li alfonte iras (s.f.). 10. Kovrado ĉiufanke per tuko speciale destinita kaj alĝustigita por tio (s.f.). - Eraro pri ĝi estas anakronismo. 11. - Fakuloj pri informatiko.

### Vertikale :

1. - Ĝi bone akordiĝas kun tinuso. 2. - Arbedo, kies branĉoj estas uzataj kiel Kristnaska ornamaĵo. - La du trionoj de sep. 3. - Ero de la tria ĉapitro de la Fundamenta Krestomatio (s.f.). - Ekstreme. 4. - Rezinoriĉa ligno. Abismo kaj punloko en Hadeso (aŭ arkaika formo de tartro (s.f.)). 5. - Infancece, senartifike. - Tribestra. 6. - Sufikso. - Tio, kio restas por malfrua gasto (s.f.). - Germana marko (siglo). 7. - Tio, kio estas konforma al la realaĵo (s.f.). - Tempo, kiun bezonas astro por troviĝi en la sama punkto de sia revoluo. 8. - Mamulo vivanta en Madagaskaro. - Frazo, pruntita el iu aŭtoro kaj metita antaŭ libro aŭ artikolo. 9. - Ĝi ruĝigas lakmuson. - Grandaj en Nord-Amerikoj.


Solve de la enigmo aperinta en L! 68 :

Hor. : 1.FEMINISTIN. 2. OKULINCITE. 3. RC. MATENAS.  
4. NILA. UNIKE. 5. OTITO. ON. 6. SIGELILO. 7. IĜ. REDAKTI.  
8. DEVIO. NERV. 9. UMEA. OK. OI. 10. LA. LABOREG.  
11. KOTONECA.

Vert. : 1. Fornosidulo. 2. Ekcitiĝema. 3. MU. LIG. VE.  
4. ĪLMATERIALO. 5. NIA. OLEO. AT. 6. INTU. ID. OBO.  
7. SCENPLANKON. 8. TINI. OKE. RE. 9. ITAKO. TROEC.  
10. NESENSIVIGA.

\*\*\*\*\*  
Sacha Guitry :

\* Kio ne eltenas la ŝercon, tio malbone eltenas la pripensadon.



**La venonta numero de L! aperos fine de januaro.**

En ĝi vi trovos novan debaton per ĉenleteroj : "Mond-socialismo", novelojn, la tiom ŝatatajn "Vortojn" de Valo, pliajn intervjuojn de Pascal Dubourg en la E-mondeto, kontribuojn de Vera Sinort, poemojn, ktp, kc.,... krom la intertempe alvenintaj artikoloj viaj, kompreneble. Suplemente, se restos sufiĉe da loko, vi povos eble lerni per ampleksa studo pri "Psikotransformismo" ("por nova maniero de pensado").

Ĉar nia bulteno evoluas al pli literatureca revueto, kaj enhavas relative malmultajn grup- aŭ asoci-komunikojn postulantajn oftan aperadon, estas projekto eldoni nur 5 n-rojn en 1987 sed - se eblos - "duoblajn", tiel ke sume la abonantaro ricevos tiom da legaĵo kiom antaŭe, se ne pli !

Jen la projektita aperkalendaro :

- \* fine de januaro : N° de jan., feb., marto.
- \* fine de marto : n° de aprilo kaj marto.
- \* meze de junio : n° de juĵ., jul. kaj aŭgusto.
- \* meze de septembro : n° de sept. kaj oktobro.
- \* fine de novembro : n° de nov. kaj decembro.

Se plaĉas al vi la formulo de L!, se vi deziras helpi por pli glata administrado de la afero, kaj ricevi akurate la januaran numeron :

**PENSU JAM PRI REABONO !**

La ĉi-suba tabeleta indikas al vi vian situacion rilate al **Laŭte!** kaj kiel monprovizanto al la SAT-Broŝurservo/L!. La broŝurabonantoj-kontposedantoj bonvolu noti, ke el ilia konto estas elkalkulitaj la broŝuroj ricevataj samtempe kun tiu ĉi n-ro de L! kaj eventuale la abono al L! por 1987, se sufiĉis la provizo.

**AL LA MONDONACINTOJ por "AŬGUSTO", DANKON!**

**Dua listo de mondonacintoj** : R.P. 100 - M.T.L. 100 - J.R. 100 - Q.I. 50 - J.D. 370 - F.M. 140. Sume kun la unua listo : 3181 FF.

Abonanto de L!	Monprovizanto (al BS/L!)
<b>VIA SITUACIO</b>	
Via abono estas	En via konto
registrita ĝis <span style="border: 1px solid black; padding: 2px;"><i>kvinta</i></span>	Restas : <span style="border: 1px solid black; padding: 2px;">+ 117</span>
<span style="border: 1px solid black; padding: 2px;">dec. 87</span>	Mankas : <span style="border: 1px solid black; padding: 2px;">-</span>
Agrablajn jarfinajn festojn al ĉiuj, Kribo.	